

## Enhavo

1	Centro de Esploro kaj Dokumentado – Jarraporto (Humphrey Tonkin).....	2
2	Pasintaj konferencoj.....	4
2.1	Ronda tablo „Internaciigo de la universitatoj kaj lingva justeco“ (Michele Gazzola) .....	4
2.2	Interlingvistika simpozio en Havano (Kubo) (Sabine Fielder).....	5
2.3	Internacia simpozio helpe de Esperanto por neesperantistoj (Małgorzata Komarnicka) .....	5
3	El Universitatoj kaj Altlernejoj.....	7
3.1	Pri la 4-a interlingvistika sesio en UAM (Ilona Koutny).....	7
3.2	Doktoriga disertacio de <i>Ida Stria</i> pri la „Lingva bildo de la mondo“ (Resumo) .....	8
3.3	<i>Krunoslav Puškar</i> diplomteze pri Esperanto kiel eŭropa lingvo (Resumo).....	11
3.4	Interlingvistika kurso en la Universitato de Innsbruck .....	12
4	Bibliotekoj .....	12
4.1	Kolekto pri Planlingvoj en Vieno: “Trovento” kaj “Bildarchiv Austria” (Bernhard Tuidler) .....	12
4.1.1	La biblioteka katalogo <i>Trovento</i> .....	13
4.1.2	La bilddatumbanko <i>Bildarchiv Austria</i> .....	16
4.1.3	Bibliografio .....	19
4.2	En Vieno: Skanado de dokumentoj pri Universalaj Kongresoj .....	21
4.3	Esperanto-Materialoj en la Germana Ŝtata Biblioteko en Berlino .....	21
4.4	Esperanto-Materialoj en la Germana Federacia Arkivo.....	21
4.4.1	SAPMO .....	21
4.4.2	Kulturligo kaj la Esperanto-Organizaĵo de GDR .....	21
4.4.3	La kolekto Blanke: “Interlingvistiko – Esperantologio. Arkivo kaj Biblioteko” .....	22
5	Interlingvistikaj erar-vojoj (Reinhard Haupenthal) .....	22
6	<i>Language Problems and Language Planning</i> , volumo 39 (2015) .....	28
7	<i>Seán Ó Riain</i> – Biografio kaj bibliografio .....	30
8	Forpasis <i>Ignat Florian Bociort</i> (1924-2015).....	42
9	Serĉata administranto por ESF .....	43
10	Ĝi tre mov(ad)as – belartkonkursa rikolto .....	43
11	Enciklopedieto de Esperanto (André Cherpillod) .....	44

# 1 Centro de Esploro kaj Dokumentado - Jarraporto 2015<sup>1</sup>

Humphrey Tonkin

**Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)** respondecas pri la esplora, registra kaj lingvistika laboro ĉirkaŭanta la funkciadon de UEA. Ĝi laboras sub gvido de estraro kaj direktoro, kaj en kunlaboro kun aliaj fakaj kaj esploraj organizaĵoj kiel ekzemple *Esperantic Studies Foundation en Nordameriko* ([www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)) kaj *Gesellschaft für Interlinguistik* ([www.interlinguistik-gil.de](http://www.interlinguistik-gil.de)) en Germanio.

Estraranoj en 2015 estis *Detlev Blanke* (Germanio), *Sabine Fiedler* (Germanio), *Michele Gazzola* (Italio/Germanio), *Federico Gobbo* (Italio/Nederlando), *Wim Jansen* (Nederlando), *Christer Kiselman* (Svedio), *Mélanie Maradan* (Svislando) kaj *Roland Rotsaert* (Belgio). Direktoro estis *Humphrey Tonkin* (Usono). Ĉiuj tiuj personoj havas siajn diversajn esplorajn kaj dokumentajn taskojn kaj projektojn en aŭ apud la Centro: la ĉi-sube raportitaj laboroj estas ekzemplodonaj aŭ, en kelkaj kazoj, kernaj en la laboro de CED.

**Simpozio.** En Novjorko en majo 2015 CED kunorganizis Simpozion pri Lingvo kaj Ekskludo, kiu allogis tutan aron da influaj lingvistoj k.a.

**Esperantologia Konferenco.** La 38-a Esperantologia Konferenco okazis dum la UK en Lillo en julio 2015. La serio de Esperantologiaj Konferencoj estis lanĉita en 1978 kaj okazis ĉiujare seninterrompe de tiam ĝis hodiaŭ. Ĉi-jare, sub gvido de *Orlando Raola*, la konferenco ĵetis rigardon al la evoluo de Esperantologio tra la pasintaj kvardek jaroj kaj la perspektivoj por la estonteco, ĉefe pere de mallongaj podiaj prezentoj. Sekvis tre sukcesa afiŝa prezento (laŭ la nun ofta praktiko de fakaj konferencoj neesperantistaj). Aperis ampleksa raporto en la septembra numero de la revuo *Esperanto*. Dum la jaro aperis ankaŭ la aktoj de la 36-a konferenco (Rejkjaviko 2013). (Vd. IpI 94-95, p. 14, 22).

**LPLP.** La revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj lingvoplanado) atingis en 2015 sian 39-an jarkolekton. Temis pri la dua jarkolekto sub redakto de *Timothy Reagan* (Universitato Nazarbajev, Kazahio). Aldone al la kutimaj socilingvistikaj artikoloj (ĉefe en la angla sed ĉiam kun resumoj en Esperanto) aperis en la unua numero de 2015 artikolo pri la kreskanta rolo de la planlingva temo en lingvistika kaj lingvopolitika literaturo, de *Sabine Fiedler*, redaktoro de la interlingvistika sekcio de la revuo. La dua numero ankaŭ enhavis interlingvistikan artikolon. La tria numero estis speciala numero (sub redakto de la CED-direktoro *Humphrey Tonkin*) pri la Simpozio pri Lingvo kaj Egaleco, organizita en kunlaboro kun CED en Novjorko en la jaro

---

<sup>1</sup> Konsiderante diversajn kritikojn pro la malgrandeco de la literoj, kiuj por kelkaj legantoj malfaciligas la legadon, ekde ĉi-tiu kajero ni klopodos plibonigi la legeblon per pli grandaj literoj (Red.).

2014. *Federico Gobbo* kaj *Frank Nuessel* daŭrigis sian laboron en 2015 kiel recenzaj redaktoroj. La revuo estas eldonata de John Benjamins (Amsterdamo) en kunlaboro kun CED. (Vd. ĉi-kajere p. 28-31).

**MLA-Bibliografio.** Daŭrigis sian laboron ĉe MLA (la usona asocio pri modernaj lingvoj) kiel bibliografo pri interlingvistiko kaj planlingvoj *Wim Jansen*. Tiu ĉi granda akumula bibliografio, konsultebla en ĉiuj ĉefaj esplorbibliotekoj de la mondo, donas ampleksajn informojn pri novaj artikoloj kaj libroj literaturaj kaj lingvistikaj, en ĉiuj lingvoj. Ĝi enhavas ampleksan sekcion pri Esperanto kaj planlingvoj kun miloj da unuopaj eroj, kaj estas la plej kompleta tia Esperanto-bibliografio se temas pri la fakaj kontribuoj de la pasinta kvardeko da jaroj. CED-estrarano *Federico Gobbo* kunlaboras ankaŭ kun la *Linguistic Bibliography* de la Konstanta Internacia Komitato de Lingvistoj rilate registron de novaj interlingvistikaj eldonaĵoj.

**Informilo por Interlingvistoj.** *Ipl*, kiu donas aktualajn informojn pri novaj eldonaĵoj, konferencoj, referaĵoj kaj similaj fakaj novaĵoj kaj estas vaste distribuata al esperantologoj kaj interlingvistoj (legebla en la reto de ESF, [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)), aperis regule sub la redakto de *Detlev Blanke*. GIL (Gesellschaft für Interlinguistik) aperigas similan germanlingvan version, *Interlinguistisches Informationen*, celantan germanlingvanojn, ankaŭ sub redakto de D. Blanke.

**INDECS.** Aperis en aprilo 2015 speciala numero de la anglalingva revuo *INDECS: Interdisciplinary Description of Complex Systems* sub redakto de *Humphrey Tonkin* kaj *Veronika Poór*. Ĝi kunigis artikolojn de dekduo da fakuloj (inter ili, pluraj estraranoj de CED) sub la ĝenerala temo “La Fenomeno de Esperanto.” Inter la temoj de tiuj artikoloj estis fakliteratura superrigardo (*D. Blanke*), komplekseco en rilato al planlingvoj (*I. Koutny*), la kultura historio de Esperanto en Japanio (*S. Konishi*), kaj Esperanto el la vidpunkto de gramatiko (*W. Jansen*), frazeologio (*S. Fiedler*), edukado (*D. Charters*) kaj maŝintradukado (*F. Gobbo*). Kompletigis la kolekton artikoloj de *H. Tonkin*, *W. Blanke*, *A. Wandel* kaj *K. Puškar*. La speciala numero estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA aŭ konsultebla ĉe la reto ([www.indecs.eu](http://www.indecs.eu)) (Vd. ankaŭ *Ipl* 94-95, p. 16-17.)

**CED-Fonduso.** CED havas je sia dispono fonduson por subvencii esplorprojektojn. La fonduso donas malgrandajn subvenciojn por helpi pri aperigo de studoj, studvizitoj al bibliotekoj kaj konferencoj, organizado de seminarioj kaj konferencoj, kaj similaj fakaj projektoj. Ĝin gvidas tri-persona komisiono: *Detlev Blanke* (Germanio), *Christer Kiselman* (Svedio) kaj *Nikola Rašić* (Nederlando). La fonduso funkcias dank’ al financa subteno de ESF.

**Amsterdamo Katedro.** UEA estas sponsoro de la Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdam, kies nuna profesoro estas *Federico Gobbo* (Italio).

## 2 Pasintaj konferencoj

### 2.1 Ronda tablo “Internaciigo de la universitatoj kaj lingva justeco”

La 23-an de novembro 2015 ĉe la urba biblioteko “N. Ginzburg” en Torino, Italio, okazis la ronda tablo “*internaciigo de la universitatoj kaj lingva justeco*”. La ĝenerala celo estis diskuti la efikojn de la internaciigo de la universitatoj sur lingva diverseco kaj sur la alirado al scio en la teknikaj fakoj kaj en la hom-sociaj sciencoj. La rondan tablon organizis la asocio Nitobe “por lingva justeco kaj lingva demokratio” kun la Centro Esperanto Torino (CET) kaj la Kultura Centro Lombroso. CET malavare subtenis la eventon.

Kontribuis al la ronda tablo kvin prelegantoj, kiuj havis malsamajn opiniojn pri la fenomeno de la internaciigo de la universitatoj, kiu praktike signifas instrui nur en la angla lingvo (la vorto “anglalingvigo” estis uzata). La programo estis la jena:

*Prof. Claudio Marazzini*, Prezidanto de la Akademio de la itala lingvo (“Accademia della Crusca”) kaj profesoro ĉe la Universitato de la Orienta Piemonto, Vercelli, donis enkondukan prelegon pri la historio de la itala lingvo kiel lingvo de sciencoj.

*Prof. Emilio Matriccioni*, Profesoro pri inĝenierio ĉe la Teknika Universitato (Politekniko) de Milano kaj prezidanto de la Komitato “Gepatra lingvo”, parolis pri la rilato inter scienca kreiveco kaj la uzo de la gepatra lingvo en instruado.

*Prof. Bernardino Chiaia*, iama vic-rektoro de la Teknika Universitato (Politekniko) de Torino kaj profesoro en la sama universitato, prezentis la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la procezo de internaciigo ĉe la Politekniko de Torino.

*D-ro Michele Gazzola* de la Universitato Humboldt de Berlino, esploristo pri lingvo-politiko kaj lingva ekonomio, montris kial la nuntempa tendenco instrui nur en la angla lingvo en kelkaj universitataj programoj en kontinenta Eŭropo estas ĝenerale malefika kaj maljusta.

*Prof. Pietro Biancone*, profesoro pri ekonomiko ĉe la Universitato de Torino kaj direktoro de la Eŭropa esplorcentro pri islama financo, klarigis kial estis necese anglalingvigi kelkajn universitatajn programojn pri ekonomiko kaj financo en la Universitato de Torino.

Sekvis interesa kaj fruktodona debato dum kiu evidentiĝis, ke la subteno al la anglalingvigo de la universitata instruado estas malpli forta ol tio, kiun oni ofte kredas. Same evidentiĝas, ke esperantistaj organizoj sukcesas organizi allogajn eventojn kiam ili pritraktas ĝeneralajn temojn, kiuj interesas al la granda publiko

kiel, ekzemple, lingva justeco, lingvaj rajtoj kaj egaleco en la scienca komunikado.

Ĉeestis pli malpli trideko da partoprenantoj. La publiko starigis multajn demandojn. La debaton oni povas aŭskulti en la itala lingvo ĉe Radio Radicale (Radikala Radio): <http://bit.ly/1Jb4DRT>.

Redaktis, *Michele Gazzola*, sekretario de la asocio Nitobe ([www.nitobe.it](http://www.nitobe.it))

## **2.2 Interlingvistika simpozio en Havano (Kubo)**

La 17-an de novembro 2015 okazis en la Universitato de Havano simpozio kun la titolo „Esperanto: Lingvistika kaj Socikultura Fenomeno“. Ĝi havis la taskon doni scienca bildon pri la planlingvo ĉefe al reprezentantoj de filologiaj fakultatoj, esplorcentroj kaj aliaj institucioj kun rilato al lingvistiko, instruado de fremdaj lingvoj kaj tradukado.

La simpozion oni bonege preparis. I.a. la invititoj ricevis ekzempleron de la ĵus aperinta INDECS-volumo “The Phenomenon of Esperanto”. La programo konsistis el kvar prelegoj kun diskutoj, kiuj permesis multflankan prilumadon de la temo. Komence *Juan R. Rodríguez* donis superrigardon pri Esperanto en Kubo (1904-2015), sekvis tri prelegoj: *Prof-ino Sabine Fiedler* (Universitato de Leipzig, Germanio) parolis pri interlingvistiko kaj Esperanto (la prelego estis tradukita en la hispanan), *Prof-ro Duncan Charters* (Principia College in Elsau, Usono) pri lingvistikaj kaj socikulturaj spertoj de Esperanto-instruado kaj *Prof-ro Orlando Raola* (Santa Rosa Junior College, Usono) pri Esperanto nuntempe (inkludante ekz. informojn pri la Akademio de Esperanto kaj spertojn pri literatura tradukado).

La simpozio estis sukcesplena. Dum la fina diskuto multaj el la invititaj gastoj sincere eprimis, ke ili antaŭe nenion sciis pri la disvastiĝo kaj utilo de Esperanto. Ili dankis pro la ebleco sin informi pri tiu studobjekto, kiun ili nun konsideras serioza kaj pretas subteni. Oni pripensas okazigi lingvo-kursojn en la universitato de Havano kaj kelkaj lernejoj kaj krome la subtenadon de konkreta libroprojekto pri Esperanto. (*Sabine Fiedler*)

## **2.3 Internacia simpozio helpe de Esperanto por neesperantistoj**

La 23-an de novembro 2015 en Wrocław, en la konstruaĵo de Ekonomika Universitato, okazis la Internacia Simpozio „Pliiĝuloj en diversaj kulturoj“. La simpozio estis direktita al neesperantista publiko kaj interesiĝantaj esperantistoj. Ĝin iniciatis kaj organizis esperantistoj el la Centro de Interkultura Edukado (BR Vroclavo) kaj la brazila Centro Internacional de Comunicação Bona Espero-Unio Planeda, Brasilia, kunlabore kun la neesperantista organizaĵo Vroclava Centro de Pliiĝuloj.

La elektitan temon – bildo de sociaj rajtoj kaj rolo de pliaĝuloj en antikvo kaj hodiaŭo en diversaj landoj – prezentis invititaj prelegantoj el polaj universitatoj kaj, danke al esperantistaj kontaktoj, el Brazilo, Germanio, Hungario, Italio kaj Usono. Ĉe la komenco kaj ĉe la fino de la aranĝo estis prezentitaj filmoj pri la ĉijara Festo de Pliaĝuloj en Brazilo kaj en Wrocław. La Simpozio estis gvidata dulingve – en la pola kaj en Esperanto. La prelegoj de eksterlandanoj estis senpere tradukitaj pollingven kaj ĉiuj tekstoj aperos dulingve.

La prelegon „Rajtoj de pliaĝuloj en Brazilo” de *Ursula Grattapaglia* ni planis prezenti per skajpo sed, pro neatenditaj teknikaj problemoj, prezentis ĝin la vroclava esperantisto *Andrzej Kraszewski*. *D-ro Walentyna Wnuk* prezentis en sia prelego la potencialon de la malfrua matureco en Pollando. *Profesorino Ilona Koutny* prelegis pri la kunlaboro inter diversaĝuloj kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj *Małgorzata J. Komarnicka* priparolis rezultojn de esploroj, kiujn ŝi gvidas inter pliaĝuloj – partoprenantoj de Esperanto-kursoj. La prelego de *profesoro Ronald Glossop* temis pri Esperanto kaj ĝia utileco por ĉiu aĝo.

*D-ro Monika Humeniuk-Walczak* vekis grandan intereson, prezentante la pozicion de maljunuloj en la popola islamo. Pozitive akceptita estis la prelego de *Wera Blanke*, kiu laŭ sia aktora sperto, prezentis kelkajn teknikajn konsilojn por publika parolado.

La prelego de la doktoriĝonto *Ilona Zakowicz* montris bildon de maljuneco en Pollando, en socia kaj kultura dimensioj. La prelego de *profesoro Davide Astori* “Maljunuleco en la antikvaj tempoj (greka, romia, hebrea kaj kristana), estos prezentita nur presforme pro tio, ke la aŭtoro ne povis veni.

La Simpozio ĉeestis pli ol cent personoj, ne kalkulante la oficialajn gastojn, tradukistojn kaj prelegantojn. Fono de la Simpozio estis ekspozicio priskribanta historion de Esperanto. Ĝi estis organizita surbaze de materialo portita al la aranĝo de esperantistoj el Wrocław, Gliwice kaj Lublin.

La internacia simpozio efektivigis nian intencon, montri al neesperantistoj la eblecon utiligi la internacian lingvon je scienca nivelo. Nia unua tiuspeca aranĝo jam plenumis gravan rolon: ĝi montris, ke esperantistoj scipovas organizi, kune kun neesperantistoj, altnivelan, edukan aranĝon.

La lokaj ĵurnalistoj pozitive skribis pri la aranĝo. Oni jam petis organizi novan E-kurson kaj mi ricevis la inviton prelegi pri Esperanto en la altlernejo, populare nomata „Papa Universitato”, prestiĝa en nia urbo. Mi ĝoje aldonas, ke la Simpozio patronis la Prorektoron pri Didaktiko de la Ekonomika Universitato *prof. dr. hab. inĝ. Edmund Cibis*, reprezentanto de la Rektoro de UTA de Ekonomika Universitato *dr. inĝ. Marek Urban*.

Reprezentitaj estis ankaŭ la organizaĵoj Universala Esperanto Asocio, Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj ĉe Adam Mickiewicz Universitato en Poznan kaj la Interkompreniĝo de Plenrajtigitoj de la Altlernejaj Rektoroj por la

Universitatoj de la Tria Aĝo en Wrocław. Amaskomunikilan Patronecon plenumis „Gazeta Senior“, Pola RetRadio kaj la brazila „União Planetária – TV SUPREN“

Nome de la organizantoj  
*Małgorzata J. Komarnicka*

### **3 El Universitatoj kaj Altlernejoj**

#### **3.1 Pri la 4-a interlingvistika sesio en UAM**

La persistaj partoprenantoj de 4-a interlingvistika sesio en la poznana universitato Adam Mickiewicz (30.01-05.02.2016) spertis mildan februaran veteron. Ne nur komence, en septembro 2014, la grupo estis rekorda, sed ankaŭ nun ĝi estas tia: 17 studentoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando kaj po unu el Belgio, Ĉeĥio, Kroatio, Rusio, Serbio kaj Svedio) progresas en siaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Ĉi-jare *d-ro Ulrich Lins*, aŭtoro de „La danĝera lingvo“, prezentis la movadhistorion de Zamenhof ĝis post la dua mondmilito kun multaj interesaĵoj. La aliajn tri kursojn gvidis *prof. d-ino Ilona Koutny* envolvante la gestudentojn en diskutojn kaj ludojn. Kadre de aplikata lingvistiko temis pri leksikografio, rolo de tekstaroj, lingva planado, multlingvismo kaj denaskismo ĝis komputa lingvistiko, kie esperanto havas specialan rolon. Kontribuis ankaŭ *d-ro Marc Bavant* pri terminologio kaj *prof. d-ro Zbigniew Galor* pri lingvo kaj socio.

La tria semestro de esperanta gramatiko prilumis la riĉecon de esperanta leksiko inklude frazeologiaĵojn transprenitajn kaj originajn. Tiklaj punktoj de vortfarado, la enleksikiĝintaj signifoj evidentigis la influon de la lingvokomunumo. *Ilona Koutny* traktis la problemojn de lingvotavoloj, skizis la evoluon de esperanto kaj la lokon de esperanto laŭ tipologio de naturaj lingvoj. Enkadre de pragmatiko, preskaŭ neesplorata tereno koncerne esperanton, okazis diskutoj pri kutimoj en lingvouzo (alparoloj, petoj kaj aliaj ĝentilecformoj) serĉante normojn kaj limojn de komunaj scioj kaj eblaj supozoj en internacia parolkomunumo.

La merkreda komuna vespero estis bonetosa: ni aŭdis tradukitajn poemojn de *Suso Moinhos* kaj kantojn de *Suzana*, krome informojn pri la elementa lernejo, kie komenciĝis instruado de esperanto kunlabore kun la Interlingvistikaj Studoj. Post la sesio, sabate okazis ekskurso al Vroclavo, kiu estas ĉi-jare eŭropa kultura ĉefurbo kaj gastos IJK-n. Lokaj esperantistoj kaj partoprenantoj de la universitato de la tria aĝo akceptis kore la grupon.

En la tria jaro de la studoj, nome en la studjaro 2016/17 okazos specialiĝoj pri internacia kaj interkultura komunikado, esperanta lingvistiko, esperanta literaturo kaj instruado de esperanto. La lasta, la instruista specialiĝo, plenumas gravan rolon en la formado de instruistoj, pro tio ni atendas aliajn *interesitojn*, kiuj volas dediĉi unu jaron al profesiiĝo en instruado kadre de la kunlaboro de

UAM, ILEI kaj *Edukado.net*. La intensa surloka metodika formado (intrumetodoj, lernmaterialoj, kursplanado, ekzamensistemo ktp) enhavas ankaŭ koncizajn kursojn pri E-gramatiko, E-literaturo kaj movado, krome eblas partopreni la aktualajn kursojn de la 3-jaraj postdiplomaj studoj (ĉi-foje *d-ro Renato Corsetti* gvidos kurson pri la nuntempa esperanto-movado). Necesas alveni por unusemajna intensa sesio fine de septembro kaj komence de februaro. Eblas aliĝi ankaŭ al la aliaj specialiĝoj.

Ĝus aperis la jubilea volumo de la universitata lingvistika revuo JKI 10 (Lingvo. Komunikado. Informado) kiu estas dediĉita al interlingvistiko kaj esperantologio, entenas plurajn studojn de prelegantoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj, parte prezentitaj dum la 3a Interlingvistika Simpozio en 2014. La materialo baldaŭ leĝeblos en la retejo de la revuo (<http://jki.amu.edu.pl>) same kiel la antaŭaj numeroj.

*Ilona Koutny*

### **3.2 Doktoriga disertacio de *Ida Stria* pri la „Lingva bildo de la mondo“**

*Stria, Ida (2015): Towards a Linguistic Worldview for Artificial Languages. Poznań, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza, Wydział Neofilologii, Instytut Językoznawstwa, 221 p.* (gvidis prof. Ilona Koutny; prijuĝantoj prof. Jerzy Bartmiński [Universitato Lublin], prof. Sabine Fiedler [Universitato Leipzig])

La disertacio estis sukcese defendita la 4-an de marto 2016.

#### **Resumo<sup>2</sup>**

##### ***Al la lingva bildo de la mondo por artefaritaj lingvoj***

La celo de tiu ĉi disertaĵo estis taksii la aplikeblecon de la teorio kaj praktiko reprezentitaj de la Lublina Etnolingvistika Skolo al vaste komprenataj artefaritaj lingvoj kaj prezenti limigojn de tia aliro. La laboraĵo specife celis determini kiel malsamas artefaritaj lingvoj, kiuj faktoroj distingas naturajn lingvojn de artefaritaj lingvoj kaj kiel eblas tiujn lingvojn esplori uzante la ilojn de la Lublina Skolo.

La titola semantika koncepto de *lingva bildo de la mondo* (kutime pole mallongigita kiel JOS, ‘językowy obraz świata’), bazita je verkoj de Humboldt kaj disvolvita en Pollando ĉefe de Jerzy Bartmiński, estas uzata por studi naturajn etnajn lingvojn. Ĝuse oni ankaŭ proponas komparajn studojn. La sola verko konata al la aŭtorino de tiu ĉi disertaĵo, kiu diskutis enketilan studon de lingva bildo de la mondo por artefarita lingvo, nome Esperanto, estas artikolo de Koutny (2010). Tiu ĉi disertaĵo estas ĝis nun la sola provo apliki la koncepton de JOS al pli larĝa spektro de artefaritaj (ne-etnaj) lingvoj el teoria perspektivo.

En la **ĉapitro 1. “Lingva bildo de la mondo”** la koncepto de JOS (“lingvo-enradikiĝinta interpreto de realeco, kiu povas esti esprimita en la formo de juĝoj

---

<sup>2</sup> La teskto estas stile kaj enhave senŝanĝa represo el la disertacio, p. 218-221.



pri la mondo”; Bartmiński 2012: 23) kaj ĝia historia evoluo estas klarigataj. Bartmiński opinias, ke ĉiuj lingvoj interpretas la mondon siamaniere kaj ke prudenta analizo de lingvaj esprimoj povas malkovri kategoriojn, kiujn kreis lingva komunumo. La teorio kaj metodiko disvolvitaj kiel parto de la Lublina Etnolingvistika Skolo estas prezentataj kune kun diversaj alternativaj difinoj de JOS kaj praktikaj konsekvencoj de la adopto de iu el ili. Klarigitaj al la legantoj estas ŝlosilaj konceptoj kiel *subjekto*, *perspektivo* kaj *facetoj*. Ĉiuj verkoj de la Skolo traktas etnajn lingvojn kiel nature evoluantaj en lingvokomunumoj.

En la **ĉapitro 2. “Lingvoj artefaritaj”** prezentataj estas la titolaj lingvoj el historia kaj tipologia perspektivo. Mi ankaŭ diskutas iliajn difinojn. En ĉapitro 2. estis montrite ke artefaritaj lingvoj estas difinitaj kiel lingvoj kreitaj intence de specifa(j) persono(j) (iam kiel komuna karakterizaĵo aldonite estas „kreataj dum relative mallonga periodo”). Tiuj difinoj klasifikas lingvojn surbaze de la deveno, dividante ilin en du homogenajn klasojn: artefaritaj kaj naturaj. Tamen, kiel montras la analizo en ĉapitro 2., tiuj klasoj ne estas unuformaj. Eĉ la historia superrigardo sufiĉas por konstati ke malsamaj tipoj de artefaritaj lingvoj evoluis en 5 ĉefaj etapoj:

- aprioraj en la 17a jc.,
- aposterioraj en la 19a jc.,
- formalaj en la 20a jc.,
- artaj en la 20a jc.,
- interretaj ekde la 90aj jaroj de la 20a jc.

Tiuj ĉi lingvoj diferencas ankaŭ laŭ la strukturo kaj origino de la materialo, laŭ la celo de kreado kaj ankaŭ funkcie.

Detale la problemo de binara divido inter lingvoj naturaj kaj artefaritaj estis ekzamenata en la **ĉapitro 3. “Natura aŭ artefarita”**. La analizo helpe de kvar larĝaj aroj de trajtoj ebligis identigi klason de limokazoj:

- piĝinoj,
- reviglitaj (revitalised) kaj revivigitaj (revived) lingvoj,
- kontrolitaj/minimumaj lingvoj,
- signolingvoj kaj signaj lingvoj,
- lingvaj rekonstruoj.

Lingvoj estis taksataj koncerne la difinajn trajtojn de homa lingvo laŭ Hockett, koncerne la klasojn de natureco laŭ Lyons, la nivelojn de celkonscia influo laŭ Svadost kaj modifitajn listojn de trajtoj de naturaj lingvoj laŭ Duliĉenko kaj Liu. Tiu ĉi proceduro ebligis al mi renversi la tradician dividon inter artefaritaj kaj naturaj lingvoj, montrante ke ĉiuj lingvoj estas metitaj sur la skalon inter tiuj du polusoj. Laŭanalize la menciita absoluta divido ne nur povas esti konsiderata erara, sed ankaŭ malutila al la disvolviĝo de lingvistiko kiel scienco kiu provas

malkovri la mekanismojn malantaŭ lingvaj kategorigoj per forigo de valora esplormaterialo, nome artefaritaj lingvoj.

La plej natura el artefaritaj lingvoj estas Esperanto. Al Esperanto kiel lingvo evoluanta nature estas dediĉita la **ĉapitro 4 “Esperanto kiel transira kazo”**. Estas montrite ke Esperanto evoluas nature, kvankam ĝi estas lingvo artefarite kreita. Tiu ĉi ĉapitro koncentriĝas pri la socilingvistika situacio de uzantoj de la internacia helplingvo kompare al lingvoj tradicie konsideritaj naturaj. Grava konkludo estas ke la komunumo de Esperanto-uzantoj estas dualingva komunumo. Plie, eĉ denaskaj parolantoj estas ĉiam almenaŭ dulingvaj.

La **ĉapitro 5. “Lingva bildo de la mondo por artefaritaj lingvoj”** estas teoria provo apliki la paradigmon de la Lublina Etnolingvistika Skolo al artefaritaj lingvoj kaj kelkaj limokazoj. Mi skizas eblajn limigojn de tiu aliro surbaze de la ŝlosilaj konceptoj de JOS aplikataj al diversaj specoj de lingvoj.

La Lublina Skolo supozas ke la JOS formiĝas en parolkomunumo enradikiĝinta en la kulturo; tiu komunumo estas la **subjekto** de la esprimado kaj kreas la strukturon (forme de facetoj) de la koncepto. Tio signifas ke la identigo de subjekto estas ege grava por ke la Lublina metodiko povu esti aplikata al iu ajn artefarita lingvo.

Tia kompreno de funkcioj de la subjekto povus signifi ke nur lingvoj kun sufiĉe granda nombro da parolantoj povus esti interesaj kiel esplormaterialo al lingvistoj uzantaj la koncepton de JOS. Por forigi tian situacion la tekstecaj kriterioj de Beaugrande kaj Dressler (1981) pruvigis helpemaj. Artefaritaj lingvoj estis taksitaj tra tiuj kriterioj kaj hierarkiigitaj de plene evoluinta lingvo tra duon-lingvo kaj tekstemo (*texteme*; “teksta modelo” laŭ Bartmiński & Niebrzegowska-Bartmińska 2010) ĝis teksto (produkto de specifa aŭtoro). Tiu hierarkio ebligas inkluzivi ĉiujn artefaritajn lingvojn en la analizo de JOS, supozante ke kelkaj el ili estas artaj kreaĵoj, kiuj povas esti esplorataj nur kiel poezio aŭ aliaj literaturaj tekstoj.

La ĉapitro 5. ankaŭ proponas esploron de JOS en Esperanto. Levitaj en tiu kunteksto estas la problemoj de multlingveco kaj semantika nebuleco. Tio igas ke ajna studo de JOS en Esperanto devus konsideri la problemon de reciproka influo de lingvo kaj kulturo en la respondantoj. La propono estas do ke la enketoj enhavu demandojn por determini la influon de aliaj lingvoj konataj al enketitoj sur Esperanto.

La **ĉapitro 6. “Esploro de problemoj sur la ekzemplo de pilota studo”** prezentas la rezultojn de la pilota studo pri la lingva bildo de la mondo de 32 altnivelaj Esperanto-parolantoj (inkluzive du denaskulinoj). Mi pravas, ke kvankam Esperanta JOS estas pli limigita ol tiu en etnaj lingvoj, ĝi klare ekzistas en la sekvaj terenoj:

- kulturaj konceptoj asociitaj kun la Movado;
- stereotipo de Esperantisto.

La studo malkaŝis multajn problemojn pro la fakto ke Esperanto-parolantoj ne estas homogena grupo. Sed samtempe ĝi konfirmis la hipotezon antaŭe starigitan: unue, ke Esperanto alproksimiĝas naturecon; due, ke multaj terenoj de la nuna JOS en Esperanto estas forte influitaj de denaskaj lingvoj kaj kulturoj de parolantoj; kaj fine, ke la kerno de la Movado prezentas koheran bildon de la mondo bazitan sur la sento de aparteno al la komunumo, ĝia kulturo kaj normoj.

Teoriaj analizoj en tiu ĉi disertaĵo montris ke artefaritaj lingvoj ne estas homogena grupo kaj iliaj diversaj karakterizaĵoj necesigas diversajn perspektivojn, kiam oni provas uzi la paradigmon de la Lublina Skolo. La lingvo, kiu povas enkadre de tiu paradigmo esti traktata kiel natura, estas sendube Esperanto. Plia studo de ĉi tiu lingvo, kaj en estonteco eble ankaŭ aliaj artefaritaj lingvoj, helpos pligrandigi la konojn pri la homa kapablo uzi lingvon.

### **3.3 *Krunoslav Puškar* diplomteze pri Esperanto kiel eŭropa interlingvo**

*Puškar, Krunoslav (2012): Esperanto as Europe's (new) lingua franca? Attitudes and opinions about a neutral European Language by Croatian Esperantists (Graduation thesis [Diploma laboraĵo]). Zagreb: University of Zagreb. Faculty of Humanities and Social Sciences, Dept. of English, 167 p. (Mentoro: Prof. Dr. sc. Damir Kalogjera).*

#### **Resumo**

##### ***Sinteno de kroataj esperantistoj pri neŭtrala Eŭropa lingvo***

La ĉefa celo de la laboraĵo estis pritrakti la koncepton de lingvafrankao kadre de la unuiĝinta Eŭropo kaj kompari la anglan kaj Esperanton kiel eblajn kandidatojn, kiuj povus efektive plenumi tiun rolon. Por doni gravecon al tiu ĉi esploro, 108 kroataj esperantistoj, kiel la plej informitaj konantoj de la tuta Esperanta fenomeno, estis demanditaj pri siaj sintenoj al la kompleksa socia, ekonomia kaj interlingvistika afero per ampleksa enketilo. La ĉefa motivo, kial ni decidis enketi esperantistojn, estis la jena: ne ekzistas multaj multifacetaj socilingvistikaj esploroj pri Esperanto el esperantista vidpunkto. Pro tio estas tiu esploro tutcerte grava kaj valida por ke oni pli precize komprenu kiel la esperantistaro perceptas Esperanton kaj ĝian movadon.

La sampla de niaj partoprenintoj konsistis el ambaŭ-seksaj membroj de Kroata Esperanto-Ligo, kaj aktivaj kaj (plu) neaktivaj movadanoj. La proporcio de inaj kaj viraj partoprenintoj estis ekvilibrita: precize 54 viroj kaj 54 virinoj partoprenis la esploradon. La averaĝa aĝo de la tuta sampla, kiu aĝas ekde 14 ĝis 89 jaroj, montras ke la esperantistara aĝstrukturo estas tre alta kaj maltrankviliga: 49,28 jaroj. Koncerne la edukon de la partoprenintoj, la rezultoj montris, ke esperantistoj estas ĝenerale altedukitaj. Alia variablo montras al ni, ke Esperanto plejparte alireblas en urboj kaj urbetoj: 95,33%, kio diras multe rilate al alirebleco de la movado kaj la lingvo.

Sed tiu ĉi esplorparto estis nur aldona parto de la studo. La ĉefa celo de nia esploro rilatis al gravaj demandoj koncerne la Esperanto-fenomenon, la strukturon de Esperanto kaj la Esperanto-movadon. Entute, la partoprenintoj respondis al speciale konstruita 33-demanda enketilo per unu el 3 respondeblecoj (JES, NE kaj EBLE). La ampleksaj esplorrezultoj troviĝas en aparta artikolo, kiu estis ĉi-jare publikigita en la anglalingva kroata sciencgazeto INDECS: <http://indecs.eu/2015/indecs2015-pp322-341.pdf>.

### **3.4 Interlingvistika kurso en la Universitato de Innsbruck**

Ekde la somera semestro 2016 en la universitato de Innsbruck/Aŭstrio *Bernhard Tuidar*, la respondeculo pri la *Planlingva Kolekto de la Aŭstria Nacia Biblioteko*, gvidos la kurson „Esperanto – lingvo kaj sistemo“. Laŭ la celo de la kurso temas pri enkonduko en la gramatikon de la planlingvo, pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj, planlingvaj movadoj kaj problemoj de interlingvistiko. Tuidar do daŭrigas la tradicion de scienca instruado, kiun dum jardekoj realigis *prof. d-ro Hermann Ölberg*, albanologo kaj interlingvisto (pri Ölberg vd. IpI 94-95, p. 19).

## **4 Bibliotekoj**

### **4.1 La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.**

**La bibliotekaj katalogoj „Trovento“ kaj „Bildarchiv Austria“**

Bernhard Tuidar

Katalogoj – registroj de dokumentoj kaj kolektoj, kiujn disponigas centro por dokumentado kaj informado – estas la esencaj reserĉiloj de ĉiu biblioteko. Ili estas tre gravaj ne nur por la dokumentado de la tuta havaĵo kaj tiel ebligas laŭsisteman kolektadon, sed ili estas ankaŭ pruvo por tio, kiuj verkoj de persono aŭ korporacio, kiuj eldonoj de difinita verko kaj kiuj verkoj pri temo (ekz. persono, termino, korporacio, ktp.) estas konservitaj kaj disponigitaj en la kolekto.

Ĝis la 1990-aj jaroj la havaĵoj de bibliotekoj estis precipe dokumentitaj per katalogoj en volumoj kaj slipoj.

La enkonduko de *Online Public Access Catalogues* (OPAC) ebligis ne nur la uzon de pli kompleksaj esplorstrategioj, sed ankaŭ la rektan ligilon de unuopaj katalogeroj kun la ciferecigitaj verkoj. Tiel pli kaj pli ciferecaj dokumentoj estas senpage rigardeblaj per la katalogoj.

La celoj de la projektoj pri katalogado de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo estas la kompleta elektronika katalogado de la havaĵo, kaj la disponigo de la katalogoj per la interreto. Tiuj projektoj ankaŭ parte inkluzivas

la interretan prezentadon de jam ciferecigitaj dokumentoj, ekzemple koncerne la librojn kaj revuojn, la fotografaĵojn, la bildpoŝtkartojn, la muzeajn objektojn kaj la afiŝojn.

#### 4.1.1 La biblioteka katalogo *Trovanto*

En la Kolekto por Planlingvoj komenciĝis en 1996 la elektronika katalogado de libroj, gazetoj kaj revuoj. En 2005 finiĝis la retrospektiva katalogado kaj tiam ankaŭ realiĝis la datumigrado en novan biblioteksistemon (*Aleph*).

Tiel oni povas jam dum preskaŭ 20 jaroj tute sendepende de la loko kaj horo traserĉi la havaĵon per la *katalogo Trovanto*, kiu estas parto de la ĝenerala katalogo – la tiel nomata *Quicksearch* – de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Trovanto estas alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, kiu estas legebla ne nur en la germana kaj la angla, sed ankaŭ en Esperanto. La katalogeroj en Trovanto ricevas kapvortojn en la germana kaj en Esperanto, tial ambaŭ lingvoj estas uzeblaj por reserĉado. Pro la integro de la bildkatalogo – *Bildarchiv Austria* – en Quicksearch ekde 2013 oni povas traserĉi per Trovanto ĉiujn katalogitajn materialojn – pli ol 45.000 katalogerojn – de la Kolekto, ne nur librojn, gazetojn kaj revuojn, sed ankaŭ kompaktajn diskojn, DVD-ojn, sonbendojn, bildmaterialojn – fotojn, bildpoŝtkartojn, glumarkojn, muzeajn objektojn, afiŝojn – kaj arkivaĵojn<sup>3</sup>.

La katalogeroj de la bildmaterialoj enhavas kaj skribitan informon kaj bildeton de la koncerna objekto. Krome la datenaro de pli ol 500 libroj<sup>4</sup> kaj 50 diversaj periodaĵoj<sup>5</sup> havas rektan ligilon al la ciferecigita verko, por ke bibliotekuzantoj, kiuj ŝatus legi unu el tiuj presaĵoj, povu tute libere kaj senpage foliumi kaj legi ilin ĉe ĉiu ret-aliro, ankaŭ ekstere de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Tiu servo ankaŭ montras, kiel la esploroj kaj uzebloj ŝanĝiĝis dum la pasintaj 20 jaroj. En 1990 legantoj per relative granda elspezo de tempo ankoraŭ devis iri al la biblioteko, traserĉi la katalogon de slipoj, mendi la presaĵojn surloke kaj atendi, ĝis kiam ili povis legi ilin en la legsalono, sed nuntempe reserĉado kaj mendado eblas komforte per la interreto.

---

<sup>3</sup> Inter la arkivaĵoj, kiuj estas konservitaj en la Kolekto por Planlingvoj, troviĝas ankaŭ 21 antaŭlasaĵoj kaj postlasaĵoj. La plej ampleksaj estas tiuj de *Kálmán Kalocsay* (1891-1976), *Eugen Wüster* (1898-1977), *Engelbert Pigal* (1899-1978), *Walter Mudrak* (1904-1998), *Andreas Juste* (1918-1998), *Jacques Bol* (1922-2009) kaj *Manuel de Seabra* (1932\*). Liston de la antaŭlasaĵoj kaj postlasaĵoj rigardeblas sur la retejo de la Kolekto por Planlingvoj. Ligilo: <http://www.onb.ac.at/esperantomuseum/15364.htm>.

<sup>4</sup> La skanitaj libroj koncernas precipe la fruajn Esperanto-presitaĵojn, kiuj estis publikigitaj antaŭ 1910. Ligilo: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>.

<sup>5</sup> Entute estis ciferecigitaj ĉirkaŭ 600 jarkolektoj (fine de 2014) el la periodo inter 1889 kaj 1943. Ligilo: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>.

Pro la daŭre kreskanta nombro de ciferecigitaj verkoj ofte eĉ ne necesas iri surloke en la bibliotekon por ricevi la deziritajn informojn, ĉar jam multaj ciferecigitaj verkoj estas rigardeblaj per la katalogo Trovanto.

Alia granda avantaĝo de ciferecigado estas la senfinaj malfermaj horoj de la virtuala legsalono, kiu estas – alirebla per la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko – malfermita 24 horojn en unu tago, en 7 tagoj dum la semajno kaj kiu iĝas daŭre pli ampleksa pro la regula aldonado de novaj reproduktaĵoj. La apliko kaj uzo de la interreto tiel kaŭzas enorman ŝanĝon rilate al utiligstrategioj, relative ampleksan virtualan legsalonon kun permanentaj malfermaj horoj kaj sekve de tio instigon kaj potencialan intensivigon de sciencaj esploroj.

Trovanto ebligas elekti inter du serĉmanieroj, konsekvence la reserĉebloj estas tre variaj. Alternative al la „simpla serĉo“ („Einfache Suche“) oni povas ĉe la „ampleksa serĉo“ („Erweiterte Suche“) entajpi en maksimume 3 diversaj kategorikampoj serĉvortojn, kiuj poste estas kombinitaj. Rekomendindaj serĉvortoj estas titoloj, temoj, eldonjaroj, eldonejoj kaj nomoj de aŭtoroj aŭ korporacioj.


The screenshot shows the search results page for 'Interlingvistiko' on the Austrian National Library website. The page is in German and displays 6 search results for 'Interlingvistiko' in Esperanto. The results are sorted by relevance. The first result is an article by Atanasov, Atanas D. (1985). The second is a book by Behrmann, Hermann (1978). The third is an article by Givoje, Marinko (1979). The fourth is a book by Szerdahelyi, Istvan (1983). The fifth is a book by Oljanov, Violin (1985). The sixth is an article by Szerdahelyi, Istvan (1979). The page also shows search filters on the left, such as Medium, Erscheinungsjahr, Thema, Person/Institution, Sprache, and Standort.

[http://search.obvsg.at/primo\\_library/libweb/action/search.do?jsessionid=E35F9D42D91D33930723672250BA41B4?fn=search&ct=search&initialSearch=true&mode=Basic&tab=onb\\_sondersammlungen&indx=1&dum=true&srt=rank&vid=ONB&frbg=&tb=t&v1%28freeText0%29=interlingvistiko&scp.scps=scope%3A%28ONB\\_aleph\\_esperanto%29&v1%281UI0%29=contains](http://search.obvsg.at/primo_library/libweb/action/search.do?jsessionid=E35F9D42D91D33930723672250BA41B4?fn=search&ct=search&initialSearch=true&mode=Basic&tab=onb_sondersammlungen&indx=1&dum=true&srt=rank&vid=ONB&frbg=&tb=t&v1%28freeText0%29=interlingvistiko&scp.scps=scope%3A%28ONB_aleph_esperanto%29&v1%281UI0%29=contains)

Ekzemple reserĉo laŭ la vorto „interlingvistiko“ rezultigas nuntempe liston kun entute 186 titoloj respektive katalogeroj.

Por precizigi la reserĉon kaj malpliigi la nombron de la katalogeroj, oni povas „filtr“ la liston per la facetoj, kiuj troviĝas je la maldekstra flanko de la katalogo.

Tiel eblas limigi la nombrojn de trafoj laŭ diversaj kategorioj – materialo, eldonjaro, temo, persono aŭ institucio, lingvo kaj formo – kaj optimumigi la serĉrezultojn.



The screenshot shows the search results for the book "Histoire de la langue universelle" by Louis Couturat and Léopold Leau, published by Hachette in 1903. The page is in German and includes a search bar with "interlingvistiko" and "Esperanto" selected. The book details are displayed in a structured format, including the title, authors, publisher, and year. A list of actions is provided on the right side of the page, such as "Zum e-Shelf hinzufügen", "E-Mail", "Drucken", "EndNote", "Refworks", "Delicious", "BibTex", and "RIS exportieren". The page also features a "Zurück zur Ergebnisliste" link and a "Zurück Ergebnis 109 Vor" indicator.


[http://search.obvsg.at/primo\\_library/libweb/action/display.do?tabs=detailsTab&ct=display&fn=search&doc=ONB\\_aleph\\_acc000724329&indx=3&recIds=ONB\\_aleph\\_acc000724329&recIds=2&elementId=2&renderMode=poppedOut&displayMode=full&frbrVersion=&dscnt=0&v1%281UI0%29=contains&scp.scps=scope%3A%28ONB\\_aleph\\_esperanto%29&frbg=&tab=onb\\_sondersammlungen&dstmp=1445336826135&srt=rank&mode=Basic&dum=true&tb=t&rfnIncGrp=1&rfnGrpCounter=1&mulIncFctN=facet\\_creator&v1%28freeText0%29=interlingvistiko&vid=ONB&fctIncV=Couturat%2C+L](http://search.obvsg.at/primo_library/libweb/action/display.do?tabs=detailsTab&ct=display&fn=search&doc=ONB_aleph_acc000724329&indx=3&recIds=ONB_aleph_acc000724329&recIds=2&elementId=2&renderMode=poppedOut&displayMode=full&frbrVersion=&dscnt=0&v1%281UI0%29=contains&scp.scps=scope%3A%28ONB_aleph_esperanto%29&frbg=&tab=onb_sondersammlungen&dstmp=1445336826135&srt=rank&mode=Basic&dum=true&tb=t&rfnIncGrp=1&rfnGrpCounter=1&mulIncFctN=facet_creator&v1%28freeText0%29=interlingvistiko&vid=ONB&fctIncV=Couturat%2C+L)

Alklako de katalogero vidigas la bibliografiajn detalojn, interalie la aŭtoron, titolon, eldonlokon, eldonejon, eldonjaron, nombron da paĝoj, lingvon kaj la serĉvortojn.<sup>6</sup>

Ĉe la ligilo „Aktionen“ oni povas printi la katalogeron aŭ sendi ĝin kaj al retadreso kaj al literaturprogramo, ekzemple *Endnote* aŭ *Refworks*. Se jam ekzistas ciferecaĵo de presaĵo, troviĝas bildeto apud la katalogero sub la indiko

<sup>6</sup> Por plibonigi la reserĉeblojn por artikoloj, la katalogeroj de volumoj enhavantaj artikolkolektojn ekde 2006 kadre de la projekto *IV-Scan* ricevas skanaĵon de la tabelo de enhavo. Tiel oni povas rekte en la katalogero elekti kaj malfermi la indekson de tiuj volumoj. Sed Trovanto ankaŭ entenas la katalogerojn de tiuj artikoloj, kiuj estas notitaj en la tabelo de enhavo, ĉar per la projekto *IV-Scan* ankaŭ laŭsisteme kreiĝas la katalogeroj de la unuopaj artikoloj. Tial en Trovanto nun ankaŭ estas tekstoj el antologioj, festlibroj, kongresraportoj aŭ ekspoziciaj katalogoj reserĉeblaj kaj por legantoj pli facile atingeblaj.

„Links“. Per alklako de la bildeto malfermiĝas nova fenestro, en kiu oni povas trarigardi kaj legi la ciferecigitan tekston.



Skanaĵo 8 montras la titolpaĝon. Pluaj skanaĵoj montras la tutan enhavon.

[http://archiv.onb.ac.at:1801/view/action/nmets.do?DOCCHOICE=2912337.xml&dvs=1445342148149~493&locale=de&search\\_terms=&adjacency=&VIEWER\\_URL=/view/action/nmets.do?&DELIVERY\\_RULE\\_ID=1&usePid1=true&usePid2=true](http://archiv.onb.ac.at:1801/view/action/nmets.do?DOCCHOICE=2912337.xml&dvs=1445342148149~493&locale=de&search_terms=&adjacency=&VIEWER_URL=/view/action/nmets.do?&DELIVERY_RULE_ID=1&usePid1=true&usePid2=true)

Legantoj, kiuj ŝatus uzi ankoraŭ neciferecigitajn dokumentojn, povas mendi ilin per la ligilo „Bestellen/Standorte“ kaj poste utiligi la materialon en la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj, kiu estas ekipita per komputiloj por reserĉadoj, sendrata interreta konekto kaj ludiloj por kompaktaĵoj kaj DVDoj.


Krome de tio ankaŭ eblas elprunti novajn librojn per internacia telepruntado tra universitataj bibliotekoj kaj mendi kopiojn aŭ skanaĵojn laŭ la reguloj de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

#### 4.1.2 La bilddatumbanko – *Bildarchiv Austria*


Ekde la jaro 2007 granda parto de la 22.000 fotografiaĵoj de la Kolekto por Planlingvoj estas sisteme skanita kaj katalogita en la bilda katalogo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la tiel nomata Bildarchiv Austria.

Krome de tio ankaŭ realiĝis ampleksa ciferecigo kaj katalogado de bildpoŝtkartoj, glumarkoj, muzeaj objektoj kaj afiŝoj tiel, ke nuntempe troviĝas pli ol 17.000 katalogeroj en la datenbanko, de kiuj ĉirkaŭ 12.000 estas serĉeblaj per la interreto.






La Bildarchiv Austria, kiu estas same kiel la katalogo Trovanto alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, ebligas je la maldekstra flanko du serĉmanierojn, la rapidan serĉon („Schnellsuche“) kaj la profesion serĉon (Profisuche), ĉe kiu oni povas entajpi vortojn en pluraj kategorikampoj. Rekomendindaj serĉvortoj – la lingvo de dokumentado en la bilda katalogo estas nur la germana – estas nomoj de personoj, landoj kaj urboj aŭ jarnumeroj kaj okazintaĵoj, ekzemple kongresoj.




<http://www.bildarchivaustria.at/Pages/Search/QuickSearch.aspx>

Se oni alklakas je la maldekstra flanko la ligilon „Schnellsuche“ (rapida serĉo), poste elektas la diĝitan kolekton (Digitale Sammlung) „Esperanto“, entajpas la

vortojn „Kongress 1936“ kaj alklakas „Suche“ (serĉo), aperas listo kun ĉiuj ciferecigitaj bildmaterialoj de la Kolekto por Planlingvoj pri la temo kongreso 1936<sup>7</sup> – la plej granda parto de tiuj 79 bildoj rilatas al la 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno 1936.



Per alklako de katalogero malfermiĝas nova fenestro, kiu enhavas detalajn informojn, interalie ciferecigaĵon kaj mallongan priskribon de la bildobjekto.



[http://www.bildarchivaustria.at/Pages/ImageDetail.aspx?p\\_iBildID=10021057](http://www.bildarchivaustria.at/Pages/ImageDetail.aspx?p_iBildID=10021057)

<sup>7</sup> Se oni entajpas „Kongress Paris“, oni ricevas ĉiujn bilddokumentojn pri la temo Esperanto-kongresoj en Parizo, reserĉo laŭ „Plakat Deutschland“ rezultigas liston kun ĉiuj afiŝoj pri la temo Esperanto en Germanio kaj post la enigo de „Kálmán Kalocsay“ aperas ĉiuj bilddokumentoj pri Kálmán Kalocsay.

Novakiraĵoj de la Kolekto por Planlingvoj estas regule katalogitaj, tial la nombro de la katalogeroj daŭre plialtiĝos – kaj en la Bildarchiv Austria kaj en Trovanto. La projektoj pri ciferecigo havas plurajn funkciojn: Unuflanke ili plibonigu la videblecon kaj alireblecon de la havaĵo, por ke la ciferecigaĵoj estu reserĉeblaj per la interreto. Aliflanke ili protektu la dokumentojn, por ke ciferecigitaj endanĝerigitaj objektoj forlasu la klimatizitan kaj protektitan konservejon nur esceptokaze. Aldone, pro la daŭra ciferecigado la bildkatalogo jam iĝis tre bona instrumento, por serĉi pruntaĵojn por specialaj ekspozicioj aŭ ilustraĵojn por publicaĵoj.

Ĝis la fino de la 20-a jarcento estis la havaĵo de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo fakte nur restrikte videbla, por tiuj personoj, kiuj vizitis la Esperantomuzeon en Vieno. Kontraste kun tio donas nun la – pere de la sistemaj ciferecigadoj – plibonigita publika prezentado de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo unuafoje vastan videblecon „eksteren“, kiu estas konforma al ĝia interna valoro.

### 4.1.3 Bibliografio

#### Presaĵoj

- Blanke, Detlev (2008, eld.): *Plansprachliche Bibliotheken und Archive*. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007 in Berlin (= Interlinguistische Informationen, Beiheft 15). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.
- Gastgeber, Christian et al. (2009, eld.): *Change! Zukunft gestalten. Festschrift für Johanna Rachinger* (= Biblos-Schriften. Beiträge zu Buch, Bibliothek und Schrift. Band 180). Wien: Phoibos-Verlag.
- Hube, Walter (1967a): 40 Jahre Internationales Esperanto-Museum. En: *Biblos. Österreichische Zeitschrift für Buch- und Bibliothekswesen, Dokumentation, Bibliographie und Bibliophilie* 16/3, 149-153.
- (1967b): 40 Jahre Internationales Esperanto-Museum, 90. Geburtstag von Hofrat Hugo Steiner (= nepublikigita tiposkripto en la Kolekto por Planlingvoj, signo: 709.582-C.Esp-2).
- Kölbl, Andrea et al. (2012, eld.): *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt*. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (14. Juni bis 9. September 2012). München: Allitera Verlag.
- Köstner, Christina (2005): Glück im Unglück. Das Esperantomuseum an der Nationalbibliothek Wien 1938-1945. En: *Language Problems & Language Planning* 29/2, 177-186.
- Mayer, Herbert / März, Herbert (1987): Der Welt eine Sprache. Das Internationale Esperantomuseum. En: Mazal 1987, 318-322.

- Mayer, Herbert (1989): Das internationale Esperanto-Museum. Sammlung für Plansprachen. En: *Biblos. Österreichische Zeitschrift für Buch- und Bibliothekswesen, Dokumentation, Bibliographie und Bibliophilie* 38/3, 188-191.
- / Cimpa, Christian (1992): *La Internacia Esperanto-Muzeo. Historio, taskoj, perspektivoj*. Wien: IEM.
- (2008): Eine traditionelle Bibliothek und neue Herausforderungen: Die Sammlung für Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek. En: Blanke 2008, 33-36.
- (2009): Wachgeküsst. Das Esperantomuseum. En: Gastgeber et al. 2009, 71-74.
- (2012): Die Sammlung für Plansprachen der ÖNB: Geschichte und Gegenwart. En: Kölbl et al. 2012, 151-163.
- Mazal, Otto (1987, red.): *Ein Weltgebäude der Gedanken. Die Österreichische Nationalbibliothek*. Graz: Akademische Druck- u. Verlagsanstalt.
- Österreichische Nationalbibliothek (1976-2014, eld.): Jahresbericht.

## **Retpaĝoj**

*Aŭstria Nacia Biblioteko:*

[www.onb.ac.at](http://www.onb.ac.at)

*Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko:*

[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm)

*Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko:*

[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/esperantomuseum.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/esperantomuseum.htm)

*Biblioteka katalogo Trovanto:*

[http://search.obvsg.at/primo\\_library/libweb/action/search.do?dscnt=0&scps.scps=scope%3A\(ONB\\_aleph\\_esperanto\)&tab=onb\\_sondersammlungen&mode=Basic&vid=ONB](http://search.obvsg.at/primo_library/libweb/action/search.do?dscnt=0&scps.scps=scope%3A(ONB_aleph_esperanto)&tab=onb_sondersammlungen&mode=Basic&vid=ONB)

*Bilddatenbanko Bildarchiv Austria:*

[www.bildarchivaustria.at/Pages/Search/QuickSearch.aspx](http://www.bildarchivaustria.at/Pages/Search/QuickSearch.aspx)

*Skانيتaj libroj de la Kolekto por Planlingvoj:*

[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm)

*Skانيتaj periodaĵoj de la Kolekto por Planlingvoj:*

[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm)

*Antaŭlasaĵoj kaj postlasaĵoj en la Kolekto por Planlingvoj:*

[www.onb.ac.at/esperantomuseum/15364.htm](http://www.onb.ac.at/esperantomuseum/15364.htm)

## 4.2 En Vieno: Skanado de dokumentoj pri Universalaj Kongresoj

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko nuntempe skanas grandan parton de la publicaĵoj pri la *unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto*. La publicaĵoj pri la unuaj 15 Universalaj Kongresoj jam estas legeblaj en la interreto, dum la venontaj semajnoj ni iom post iom enretigos pluajn skanaĵojn.

Universalaj Kongresoj 1905-1939:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/23525.htm>

Skinitaj libroj:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

Skinitaj periodaĵoj:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>

*Bernhard Tuidler*

## 4.3 Esperanto-Materialoj en la Germana Ŝtata Biblioteko en Berlino

La ampleksa kolekto de Esperanto-materialoj kaj libroj de/pri aliaj planlingvoj, troviĝanta en la Germana Ŝtata Biblioteko en Berlin, estas konsultebla jene:

<http://staatsbibliothek-berlin.de/sammlungen/galerie/a-z/esperanto-sammlung/>

## 4.4 Esperanto-Materialoj en la Germana Federacia Arkivo

### 4.4.1 SAPMO

Post la germana unuiĝo la germana ŝtato kreis la "Fondaĵon Arkivo de Partioj kaj Amasorganizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo" kun la germana mallongigo SAPMO ("Stiftung Archiv der Parteien und Massen-Organisationen der DDR im Bundesarchiv").

La celo de SAPMO estas transpreni, daŭre konservi, uzebligi kaj kompletigi la arkivaĵojn de la partioj kaj amasorganizaĵoj kaj juraj personaĵoj de GDR. SAPMO ankaŭ konservas materialojn kaj bibliotekojn pri la germana historio. La Fondaĵo eklaboris la 3-an de januaro 1993.

(<https://www.bundesarchiv.de/bundesarchiv/organisation/sapmo/index.html.de>)

### 4.4.2 Kulturligo kaj la Esperanto-Organizaĵo de GDR

En SAPMO troviĝas ankaŭ ĉiuj aktoj de Kulturligo de GDR kun siaj multaj fakaj sekcioj, societoj, subsekcioj kaj intereso-societoj:

(→[http://de.wikipedia.org/wiki/Kulturbund\\_der\\_DDR](http://de.wikipedia.org/wiki/Kulturbund_der_DDR))

Tio ankaŭ koncernas la aktojn de la Sekcio Esperanto / de la Esperanto-Asocio (GDREA), 1965 – 1991

(→<http://www.bundesarchiv.de/fachinformationen/01207/index.html.de>).

La konsisto de la materialo estas konsultebla en registra libro :  
(→[http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b\\_esperanto/index.htm](http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm))

Ankaŭ eblas konsulti la katalogon de la biblioteko de GDREA :  
(→[http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b\\_esperanto/index.htm](http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm))

En la biblioteko de SAPMO troviĝas multaj materialoj ankaŭ pri Esperanto (Jen trovoj por 06.04.2015: Esperanto 200, Interlinguistik 10.).  
(→<http://www.bundesarchiv.de/bibliothek/F?RN=763507228>)

#### **4.4.3 La kolekto "Interlingvistiko – Esperantologio. Arkivo kaj Biblioteko"**

La 11-an de aŭgusto 2005 *Wera kaj Detlev Blanke* subskribis kontrakton kun SAPMO pri la transdono de ilia kompleta faka kolekto kiel postlasaĵo. Tamen ankaŭ dum la vivo-tempo familio Blanke povas transdoni partojn de la kolekto ("antaŭlasaĵo"). Ĝi tion parte jam faris. Do ĝis fino de 2015 al SAPMO jam estas transdonitaj diversaj materialoj. Ili estas je la dispono de interesatoj kaj konsulteblaj en la legejo (oni menciis "kolekto Blanke").  
(<http://www.argus.bstu.bundesarchiv.de/ny4604/index.htm>)

La materialoj troviĝas en

- a) la arkivo de SAPMO (dokumentoj, fotoj, postlasaĵoj  
[ekz. de d-ro Karl Schulze, GDR, tradukinto i.a. de „Faŭsto“ I+II de Goethe kaj de „Trigroŝa Romano“ de Bert Brecht])
- b) en la biblioteko (libroj, gazetoj)

Por pli precize informiĝi konsultu la retpaĝaron de Detlev Blanke:  
<http://blanke-interlinguistik.de/eo/sapmo-kolekto-blanke.html>

## **5 Interlingvistikaj erar-vojoj**

Reinhard Haupenthal

Interlingvistoj interesiĝantaj pri plia kleriĝo kaj faka instruiĝo (resp. interlingvistike interesiĝantoj) bezonas kompetentan orientiĝon por selekti la ofertatan materialon. Alie ili riskas puŝiĝi al titoloj klasifendaj kiel dubindaĵoj. Estas bedaŭrinde, ke temas eĉ pri titoloj kies aŭtoroj aktivas en la universitata scienca mondo, sed kiuj restis diletantoj en la tereno interlingvistika. La ekzemplo de *Alan Libert* (Universitato Newcastle, Aŭstralio) restas en malagraba memoro.<sup>8</sup> Ĝi montras krome, ke t. n. sciencaj eldonejoj aŭ la kompetento de aŭtoroj sur aliaj kampoj ne prezentas garantion por liveri ion

---

<sup>8</sup> Kp. *A Priory Artificial Languages*. 2000. 139 p.; *Mixed Artificial Languages*. 2003. 106 p.; *Artificial Descendants of Latin*. 2004. V, 140 p. (ĉiuj: München: Lincom).

interlingvistike solidan. Bedaŭrinde tio validas ankaŭ por la prezentata libro<sup>9</sup> de la madrida sociologo *Roberto Garvía* (\*1961) (ĉi-sekve: RG), kiu ĝis nun prezentis nur unu tem-rilatan kontribuon.<sup>10</sup>

La nuna volumo aperas kiel speco de *deus ex machina* kaj (ĉu io alia atendeblis?) en Esperantaj rondoj jam rikoltis fruajn laŭrojn.<sup>11</sup>

El la personoj dankataj en „Acknowledgments“ (p. 227) eĉ ne unu gravas interlingvistike: temas pri *adlati* por universitataj dank-ritualoj.

En sia enkonduko RG pretendas, ke lia libro temas pri „battles of artificial languages and of the social movements that supported them“ (p. 2) kun ĉefa akcento sur Volapük, Esperanto kaj Ido. Nomante la „minor contestants“ la aŭtoro subfalas al unua eraro parolante pri „Reform Neutral“ anstataŭ pri Idiom Neutral (lingvo-projekto de Woldemar Rosenberger). Pli grava ol ĉi *lapsus calamis* estas la cirkonstanco, ke jam ĉi tie RG volas sugestii, ke Volapük estas rivalo de Esperanto. Ni elmontros, ke tio estas nepardonebla metodika eraro.

Estas la tezo de RG, ke Esperanto gajnis la batalon de la plan-lingvoj, sed maltrafis la celon fariĝi „lingua franca“. Ankaŭ ĉi tie temas pri grava logika eraro, ĉar tian eldiron povas fari nur persono kiu eliras de ia „fina venko“ de Esperanto kiu jam devintus okazi.

Ĉi-sekve ni limigos nin al du aspektoj de la libro: la bibliografio (p. 199-217) kaj al „Part I. Volapük“ (p. 21-56).

La notoj („Notes“, p. 169-197) kaj la Bibliografio elmontras multajn redundancojn. Pli strikta procedado ĉe la notoj kun adekvataj referencoj povintus eviti ripetojn.

## 1. La bibliografio

Niajn riproĉojn ni povas dividi en tri grupojn:

**1.1.** mankantaj titoloj (ankaŭ represoj)

**1.2.** eraroj en nomoj kaj titoloj

**1.3.** malĝustaj alfabetigoj

---

<sup>9</sup> Roberto Garvía: *Esperanto and its rivals. The struggle for an international language*. Philadelphia: Univ. of Pennsylvania (2015). VIII, 226 p.

<sup>10</sup> Kp. Roberto Garvía: Religion and artificial languages at the turn of the twentieth century. Ostwald and Zamenhof. In: *Language Problems & Language Planning*. Amsterdam 27. 2013: 1, p. 47-60.

<sup>11</sup> Kp. la intervjuon kun José Antonio del Barrio: Nova akademia verko pri Esperanto: [www.liberafolio.org/nova-akademia-verko-pri-Esperanto](http://www.liberafolio.org/nova-akademia-verko-pri-Esperanto). Tie oni asertas, ke RG en Usono disponis pri materialo „tre malfacile trovebla en Eŭropo“. Tion povas aserti nur persono nekonanta la gravajn Volapük-kolektojn (ekzemple) en Amsterdamo, Berlino, Graz, Munkeno kaj Vieno.

**Pri 1.1.:** Strange, ke en libro okupiĝanta pri Volapük kaj Ido, mankas la bibliografioj de ĉi plan-lingvoj.

Volapük: HAUPENTHAL, SCHMIDT;

Ido: CARLEVARO/HAUPENTHAL. (Ankaŭ presitaj katalogoj bibliotekaj ne registriĝas.) Jenaj pliaj titoloj restas ne menciitaj: JESPERSEN, KÜNZLI. El represoj devintus listiĝi:

GUÉRARD 1922 → 1979; LIPTAY 1891 → 1991; SCHLEYER 1900 → 2010; ZAKREWSKI 1912 → 1979; ĴIRKOV 1931 → 1974.

(Anstataŭ „Ekrelo“ devus esti EKRELO.)

**Pri 1.2.:** Anstataŭ *American Philosophical...* 1889, 1888 devus esti citita la efektiva fonto: BRINTON k. a.

Ĉe la Beaufront-titolo (*North American Review*) mankas la aper-dato (ĉe revuo!).

BORSBOOM ne nomiĝas Erich, sed Ed[uard].

CHAPELLIER: internationale

COUTURAT/LEAU 2001: Hauptenthal ne estas la editoro, sed la aŭtoro de la postparolo.

EINSTEIN 1889: malĝusta divido: *Weltsprachep-roblem*

Anstataŭ Nurembergo devus esti Nürnberg.

GRÖBER: Entwicklung = Entwicklung (Restas neklare, kial ĉi titolo entute menciigias.)

HAUPENTHAL 1984: malĝusta divido: Saa-rbrücken

KERCKHOFFS 1887a: Commerciale internationale (RG konfuzas la anglan kaj la francan.)

KERCKHOFFS 1887b: pedipedals = pedipedelas

KNIELE 1890: Feyer = Feyel (ankaŭ p. 179)

LAPENNA k.a.: Temas pri aŭtoroj, ne pri editoroj („eds.“)

LINS 1988: gefährliche = gefährliche (ankaŭ p. 180 kaj 224).

SCHLEYER 1900: Katholische = katholisch (ankaŭ p. 180)

SZERDAHELYI: Zeichensystem = Zeichensystem

**Pri 1.3.:** (malĝustaj alfabetigoj)

de Courtenay, Jan Baudouin = BAUDOIN DE COURTENAY, Jan

de Wahl, Edgar = WAHL, Edgar von (Prorók Julien estas pseŭdonimo de Edgar von Wähl.)

Kanzi, Itô = ITÔ, Kanzi.

Mian propran nomon RG misformas jene: Reinahrd H. (p. 206), Hauptenthal (p. 173, 207).

La parto de la notoj estas simile kaosa:

p. 173: Johan = Johann (same p. 174)

p. 174: Vortrage = Vorträge

p. 175, noto 12: Schelyer = Schleyer, Staatsfurt = Staßfurt, Volaküp = Volapük

p. 177, noto 18: 1991 = 1976



p. 178, noto 6: frèeres = Frères

Eraroj troviĝas ankaŭ en la komenca parto:

p. 28: Theddäus = Thaddäus (ankaŭ p. 220)

*Eine Orientereise* by Koprinz Rudolf = *Eine Orientreise* by Kronprinz R.

p. 33: Handelsverkehrsprache = ... verkehrssprache

One human race, one language = To one... (Menade bal püki bal).

## 2. Part I. Volapük

Ni nun turnu nin al la ĉapitro Volapük. Estas tute absurde aserti, ke Volapük estis (fariĝis) rivalo de Esperanto. Volapük estis publikigita en 1879/80, Esperanto en somero 1887, sed efektive restis nekonata ĝis la fino de la 19a jarcento, t.e. eĉ en momento, kiam Volapük jam moviĝis de „zentito al nadiro“ (J. Schmidt). La ekĝermanta Esperanto-movado renkontis strukturojn kaj donitaĵojn kiujn ĝi transprenis sen esti iel originala:

- strukturita movado (lokaj grupoj, landaj asocioj)
- kongresoj (1884 Friedrichshafen, 1887 Munkeno, 1889 Parizo)
- himno
- „majstro-kulto“ kiu en Esperanto floris pli bizare ol en la Volapük-movado ĝis la formo de sengusta Zamenhof-liriko
- strategioj de la propagando

La komencoj de la Esperanto-movado tute ne imageblas sen la cirkonstanco, ke Zamenhof kaj ties adeptoj enestiĝis en Volapükaj rondoj, kie kompreneble ne necesis konvinka laboro.

Kiu do volas elmontri la interdependon de Volapük/Esperanto devas spuri ĉi detalojn. RG ne faras tion.

RG eĉ nenion dokumentas: En kiuj „ten languages“ (p. 25) laŭdire tradukiĝis la lerno-libro de Schleyer, kiu Volapük-revuo „emerged in Rotterdam“ (p. 25)?

Rimarko pri la cit-maniero de RG kaj kiel el munto-pecoj li komponas strangajn mozaikojn.

En ĉap. 6 („My Troubled Child“, The Artist and the Kulturkampf) legeblas (p. 52): „The archbishop of Freiburg used this cliché of the artist as a passionate, immature, and childish character in Schleyer’s obituary.“

Jen preskaŭ nenio ĝustas: sekvas citaĵo (en la angla!), kiu sur p. 189 estas „dokumentita“ jene: „6. Hauptenthal, *Prälat Johann Martin Schleyer*, 28“. Se oni spuras ĉi „fonton“, oni puŝiĝos al nekrologo pri Schleyer de Conrad Gröber (1872-1948) el 1913: Gröber tiam estis ne arkiepiskopo, sed parokestro de la Konstanca Trinitata Paroko.

1. RG lasas ne klara, de kiu devenas la teksto de la citaĵo.
2. Li ne citas la originalan tekston.
3. Lia traduko estas manko-hava.
4. Li misinterpretas la eldirojn en la nekrologo de Gröber.

Ĉi kunfliko de sensignifaj citaĵoj ripetiĝas sur la sama paĝo 52: Tie, kun referenco al „*Rund um die Welt*, Dez. 1890, 283-284“ (ĝuste: *RudW* 3. 1890/91: kol. 283-284) estas donita la citaĵo: „Volapük was his creation [...] Volapük is my troubled child, my needy child, my bullied child“. Ĉe ĉi „fonto“ temas pri gazet-artikolo el „Oberpfälzischer Kurier“ (Weidener Tagblatt) de la 5a de novembro 1890, kie – kun referenco al laŭdira eldiro de Schleyer – oni legas: „Volapük estas mia dolor-infano, mia sufer-infano, mia infano primokata“ (kol. 284). Estas har-starige, kion RG faras el tiaj sensignifaj gazet-notoj. Plene nerealigebla restas la referenco al „Kulturkampf“, kiu ja ludis gravan rolon en la biografio de Schleyer (fortresa aresto), sed havas nul rilaton al Volapük.

En siaj informoj pri detaloj de la libro RG montriĝis nesincera. Lige kun mia demando (E-Mail de 2015-07-09) pri rim. 19, p. 175 („in 1886 Kerckhoffs published an *Examen critique de la Langue Musicale Universelle*, which I have not been able to find“) mi komunikis al RG, ke tion li transprenis el Vikipedio kaj ĝin kredis aŭtenta, kvankam en *Yelabuk...* (p. 31) kaj ĉe STOJAN (n-ro 5742) ekzistas konkretaj bibliografiaj indikoj.

En sia respondo (2015-07-16) RG kontestis tion kaj kulpigis STALLER pri la eraro. Sed la artikolo de Staller nenie menciigis ĉe RG. Krom tio, ŝi citas (p. 341, rim. 59) tute ĝuste la verkon de GAJEWSKI/KERCKHOFFS.

## Resumo

La aŭtoro ne sukcesas elmontri, kiel, post kurta eŭforia ascendo, Volapük denove disfalis en si mem kaj kiel paralele al tio Esperanto povis iom post iom konturiĝi sen subfosi la akvon al Volapük. Ke Zamenhof kaj ties adeptoj en tio penetris en la terenon de Volapük, necesintus elmontri. Esperanto iĝis rivalo de Volapük, ne inverse, kiel volas kredi RG.

## Bibliografio

BRINTON, Daniel Garrison; Henry PHILLIPS; Moroe B. SNYDER:

Reports of the Committee appointed October 21, 1887, to examine into the scientific value of Volapük, presented to the American Philosophical Society, November 18, 1887, and January 6, 1888.

En: *Proceedings of the American Philosophical Society* 25. 1888: Nr. 127, p. 3-17.

Supplementary Report of the Committee appointed to consider an International Language. Read before the American Philosophical Society, Dec. 7, 1888.

En: *Proceedings of the American Philosophical Society* 25. 1888: 128, p. 312-318.

CARLEVARO, Tazio; HAUPENTHAL, Reinhard: *Bibliografio di Ido*. Bellinzona: Dubois; (Saarbrücken): Edition Iltis 1999. 193 p.

- GAJEWSKI, Boleslas; KERCKHOFFS, Auguste: *Examen critique de la langue universelle de Sudre*. Paris: Le Soudier 1886. 16 p.  
Unue en: *Bulletins de la Société d'Anthropologie de Paris*. Paris III. Serie. 8. 1885, p. 602-617.
- GUÉRARD, Albert Léon: *A Short History of the International Language Movement*. London: Fisher Unwin 1922. 268 p. – Repr. Westport, Conn.: Hyperion Pr. (1979). 268 p.
- HAUPENTHAL, Reinhard: *Volapük-Bibliographie*. Hildesheim, Zürich, New York: Olms 1982. VI, 124 p. – Kunbind. kun: J. M. Schleyer: *Volapük*. 1982.
- JESPERSEN, Otto: *Meine Arbeit für eine internationale Sprache*. Vom Hg. überarb. Übers. aus dem Novial von Kurt Neumann (1907-1981). Hg., mit Anm. und einer Bibliographie vers. von Reinhard Hauptenthal. (Bad Bellingen): Edition Iltis 2013. 64 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 31.)
- ĴIRKOV, L. [t. e. ŽIRKOV, Lev Ivanovič]: *Kial Esperanto venkis? Studo*. Leipzig: EKRELO 1931. 40 p. – (2. eld.) (Oosaka): Japana Esperanta Librokooperativo (1974). 40 p. (Repr. de la eld. Leipzig 1931.)
- KERCKHOFFS, Auguste: *Yelabuk pedipedelas*. Yelüp 1-2. Paris: Le Volapük (2: Le Soudier) 1887-1889. 1. 1887. 46 p.; 2. 1888/89. 1889. 176 p.
- KÜNZLI, Andreas:  
2006: *Universalaj lingvoj en Svislando. Svisa enciklopedio planlingva. Schweizer Plansprachen-Lexikon. Encyclopédie suisse des langues planifiées. Enciclopedia svizzera delle lingue pianificate. (Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua)*. La Chaux-de-Fonds: (SES et CDELI) 2006. 1129 p.  
2010: *L. L. Zamenhof (1859-1917). Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die „jüdische Frage“ in Ost- und Westeuropa*. Wiesbaden: Harrassowitz 2010. 538 p., 24 Tafeln. (Jüdische Kultur. Studien zur Geistesgeschichte, Religion und Literatur. 22.)
- LIPTAY, Alberto: *Eine Gemeinsprache der Kulturvölker*. (Nachdr. d. Ausg. Leipzig 1891.) Hildesheim, Zürich, New York: Olms 1991, XVI, 272 p.
- SCHLEYER, Johann Martin: *Über die Pfuschersprache des Pseudo-Esperanto*. (2. Nachdr. d. Ausg. Konstanz 1900.) Mit einem Nachwort von Reinhard Hauptenthal. (Bad Bellingen): Edition Iltis 2010. 14 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 22.)
- SCHMIDT, Johann: *Volapük-Bibliographie. Teil I: Literatur-Liste des Volapük. Teil II: Vollständige Zeitschriften-Liste des Volapük*. Neu hg. u. mit einem Vorwort vers. von Reinhard Hauptenthal. 2008. 8, 55, 9 p. 4°
- STALLER, Natasha: *Babel: Hermetic Languages, Universal Languages, and Anti-Languages in Fin de Siècle Parisian Culture*.  
En: *The Art Bulletin*. A Quarterly Published by the College Art Association. New York 76. 1992: 2, p. 331-354.

STOJAN, Petr Evsta'eviĉ: *Bibliografio de Internacia Lingvo* . Kun bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Genf 1929.) Hildesheim. New York: Olms 1973. 560 p.

ZAKRZEWSKI, Adam: *Historio de Esperanto 1887-1912*. [Repr. de la eld. Varsovio 1912.] Varsovio: Pola Esperanto-Asocio 1979. 144 p.

## **6 *Language Problems and Language Planning*, vol. 39 (2015):1**

### **LPLP 1/2015**

#### **Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj**

*Motives for Chinese script simplification*

Xiaxing Pan, Huiyuan Jin and Haitao Liu

*Language rights in the European Union and the Treaty of Lisbon*

Eduardo D. Faingold

*The porous borders of language and nation: English in Indonesia*

Lauren R. Zentz

*Economic phenomena and ideologies behind language shift: From nationalism and globalization to modernization and the ideology of “new”*

Paolo Coluzzi

#### **Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko**

*The topic of planned languages (Esperanto) in the current specialist literature*

Sabine Fiedler

#### **Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj**

*Erzsébet Bárat, Patrick Studer & Jiří Nekvapil (Eds.). Ideological conceptualizations of language: Discourses of linguistic diversity.*

Rezensiert von Kimura Goro Christoph

*48th International Conference on Sino-Tibetan Languages and Linguistics, University of California, Santa Barbara, 20-23 August 2015*

Carol Genetti and Chris Donlay

*Sari Pietikäinen & Helen Kelly-Holmes (Eds.). Multilingualism and the periphery.*

Reviewed by Frank Nuessel

*Tullio De Mauro. In Europa son già 103 — Troppe lingue per una democrazia?.*

Recensione di Renato Corsetti

## **LPLP 2/2015**

### **Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj**

*Language maintenance in the Caribbean: Examining perceptions of threat in Aruba and Puerto Rico*

Kevin S. Carroll

*La tirannia della tastiera: Il caso dell'ortografia piemontese*

Emanuele Miola

*Loving but not living the vernacular: A glimpse of Mazandarani-Farsi linguistic culture in northern Iran*

Seyyed-Abdolhamid Mirhosseini

*Learner agency in language planning: A tripartite perspective*

Jeff Brown

### **Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko**

*The application of C.K. Ogden's semiotics in Basic English*

James McElvenny

### **Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj**

*James M. Tollefson. Language policies in education: Critical issues*

Reviewed by Jingyang Jiang

*David C. Johnson. Language policy*

Reviewed by Fumin Fang

*Julia Sallabank. Attitudes to endangered languages: Identities and policies*

Reviewed by Frank Nuessel

*Tej K. Bhatia and William C. Ritchie (Eds.). The handbook of bilingualism and multilingualism*

Reviewed by Frank Nuessel

## **LPLP 3/2015: Special issue: Linguistic Equality**

### **Introduction**

*The search for linguistic equality*

Humphrey Tonkin

### **Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj**

*Forty years after Lau : The continuing assault on educational human rights in the United States and its implications for linguistic minorities*

M. Beatriz Arias and Terrence G. Wiley

*The rise of global English: Challenges for English-medium instruction and language rights*

Rosemary Salomone

*Zamenhof and the liberal-communitarian debate*

Esther Schor

*Parity in the plural: Language and complex equality*

Yael Peled

*Language in the United Nations post-2015 development agenda: Challenges to language policy and planning*

Mark Fettes

### **Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj**

*Michael D. Gordin. Scientific Babel: How science was done before and after global English / The language of science from the fall of Latin to the rise of English*

Reviewed by Ulrich Ammon

*Thomas Ricento (Ed.). Language policy & political economy: English in a global context.*

Reviewed by Christopher Houtkamp

## **7 Seán Ó Riain - Biografio kaj bibliografio**

La konata irlanda diplomato kaj esperantisto, *d-ro Seán Ó Riain*, la 5-an de Novembro 2015 fariĝis 60-jara. Okaze de lia vivo-jubileo, kvankam tre postdate, IpI tre kore gratulas kaj publikigas kelkajn biografiajn informojn pri la jubileulo kaj liston de liaj publikigaĵoj (Red.).

## 7.1 Skiza kariero

37 jarojn da profesiaj spertoj: 8 jarojn ĉe la Eŭropa Komisiono, 16 jarojn en 5 irlandaj ambasadoj eksterlande, laboris kun 10 ambasadoroj, 11 jarojn en Iveagh House; kaj 2 jarojn kiel preleganto pri la irlandaj lingvoj ĉe Maynooth University. Estis sekretario de la diplomatia reprezento-asocio AHCPS, Dublino, 1999-2001; proparolanto ĉe 4 de la 5 ambasadoj, donis multajn intervjuojn en la lingvoj irlandaj, angla, germana, pola kaj Esperanto.

Sperto pri dungitaro: sperto en diversaj dungitaraj aferoj. Kontrolisto de 42 oficistoj: 24 en ambasadoj eksterlande kaj 18 en Dublino. Kiel membro de la intervjuo-panelo en 2001 implikita en la nomumo de novaj diplomatoj / triaj sekretarioj por la ekstera ministerio en Dublino.

Eŭropa Komisiono (DGT), septembro 2007- julio 2015: Respondeca por la irlandaj lingvo-versio de la retejo de la Komisiono kaj por lingvopolitiko. Konstanta Rezentantaro de Irlando al la Eŭropa Unio, Bruselo, aŭgusto 2005-septembro 2007. Respondeca por la Okcidentaj Balkanlandoj kaj Latinameriko.

Ambasado de Irlando, Berlino, por publikaj rilatoj kaj kulturaj aferoj, 2001-05.

Ambasado de Irlando, Varsovio. Deputito-Ambasadoro, 1994-99. Konsultanto de Irlandaj firmaoj investantaj en Pollando, politikaj kaj ekonomiaj temoj de Pollando, respondeca pri kulturaj, agrikulturaj, administraj kaj konsulaj aferoj kaj la ambasada buĝeto. Dum tiu periodo, la irlandaj investoj en Pollando (ĉefe AIB, CRH) altiĝis de € 10 milionoj al pli ol € 1 miliardo.

Antaŭe: Unua Sekretario, Sekcio de Centra kaj Orienta Eŭropo, 1999-2001; Unua Sekretario, mezorienta Fako, 1993-94; kaj Fako de duflanka komerco, 1992-93; Dua Sekretario de la Ambasado, Kanbero, 1990-92; Fako Konsilio de Eŭropo, 1988-90, kaj 1978-79; Ambasado Vieno (kaj Daŭra Rezentantaro ĉe la Unuiĝintaj Nacioj), 1985-88; Fako de Publikaj Rilatoj, 1983-85; Divido Development Cooperation 1982-83; Kunordigo Divido EU, 1981-82.

1. Akceptiĝis por unujara kurso por ENA (Parizo, Nacia Lernejo de Administrado), 1993.
2. Rezentis Irandon ĉe la interregistara komitato de la Konsilio de Eŭropo, kiu redaktis la Eŭropan Ĉarton por Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj, 1988-1990.
3. Abituro-ekzamenanto por la irlandaj lingvoj (parola kaj skriba), 1979-1993.

## 7.2 Eduko

PH por la disertaĵo „Pleanáil Teanga en Éirinn agus i Québec“ (Lingva Planado en Irlando kaj Kebekio – Kompara studo de la lingva politiko), Trinity College Dublin, 1985.

MA (Hons.) Por la master-tezo „Gnéithe Briathartha san aimsir Láithreach“ (Verbaj aspektoj en la prezento), NUI (Nacia Universitato de Irlando) Galway 1978.

Ard-Teastas en Oideachas (Alta Diplomo en Edukado), NUI Galway, 1976.

B. A. (Hons.) En la irlanda kaj la franca, kun la germana kiel tria lingvo, 1975. Ricevis la „1916 Memorial Scholarship“ postdiploma (Postgraduate Scholarship) por la grado kun First Class Honours en la irlanda kaj unua loko en la klaso ĉe la BA ekzameno.

Unua premio en la irlanda ĉe NUI Galway en 1974, 1973, 1972.

Jurgrado (1st LL.B., 1974; 2<sup>a</sup> LL B. 1976).

Cistercian College, Roscrea, Co. Tipperary, 1967-1972.

### 7.3 Personaj informoj

Naskita: novembro 5, 1955 Tiobraid Árann. Edziĝinta al Suzanne, de franclingva Svislando; 2 filinoj: Aisling (naskita 1993) kaj Ciara (naskita 1996). Eksedziĝinta en 2016 kaj edziĝinta kun Natalie Vernick, franca ĵurnalistino.

Lingvoj: Flue irlanda, angla, franca, germana, hispana, pola, kimra, Esperanto. Kono (legado) en la skotgaela, rusa, itala, latina kaj rumana.

### 7.4 Publikigaĵoj

#### 7.4.1 Libroj

1990

**Irish is Fun-tastic**, amuza kurso por lerni la irlandan per desegnaĵoj. Kimrio: Y Lolfa.

1994

**Pleanáil Teanga in Éirinn 1919-1985** (Lingvoplanado en Irlando 1919-1985), esploro pri la formulado kaj efektivigo de irlanda lingvopolitiko. Dublino: Carbad/Bord na Gaeilge, 245 p.

1997

**Irlandia w XIX wieku - walka o niepodległość. Problem zanikającego języka irlandzkiego i jego obrona w przyszłości** (Irlando en la 19a Jarcento – la lukto por sendependeco. La problemo de la malkresko de la irlanda lingvo kaj ties antaŭenigo estonte). Poznań: Towarzystwo Polsko-irlandzkie/Pola-irlanda Asocio.



1999

**Irlandia w XIX wieku - Problem zanikającego języka Irlandzkiego i jego obrona w przeszłości** (Irlando en la 19a Jarcento – la malkresko de la irlandia lingvo kaj ties antaŭenigo estonte).

**Język irlandzki/La Irlanda Lingvo. Unia Europejska, tożsamość i zachowanie różnorodności językowej** (La Eŭropa Unio, Identeco kaj Lingva Diverseco). Tri prelegoj, en la pola kaj la angla. Poznań: Towarzystwo Polsko-irlandzkie/Pola-irlanda Asocio.

2001

**An tAontas Eorpach agus an Ghaeilge: Féiniúlacht agus Éagsúlacht Teanga/The EU and the Irish Language: Identity and Linguistic Diversity** (La EU kaj la Irlanda Lingvo: Identeco kaj Lingva Diverseco). En la irlandia kaj la angla. Dublino: Clódhanna Tta.

2007

**Esperanto tríd an Modh Díreach** – Irlanda traduko de la lernolibro de Esperanto, eldonita en 37 lingvoj. Martin, Slovakio: Stano Marček.

2009

**Liospóin Léirmhíithe/Lisbon Explained** (Lisbono klarigita) – **Treoir do Chonradh Liospóin/A guide to the Treaty of Lisbon** (gvidlibro pri la Traktato de Lisbono). Dublino: Reprezentejo de la Eŭropa Komisiono en Irlando.

2013

**Slí an Eolais agus Aigne an Ghaeil**, athchóiriú ar leabhar le Cormac Ó Cadhlaigh, fara Donncha Ó Riain agus Aibhistín Ó Duibh. (Reeldono de la verko de Cormac Ó Cadhlaigh en 1925 pri irlandaj proverboj kaj la frazeologio de la lingvo en suda Irlando.) Westport: Evertype

2015

Irlanda traduko de **Lingvomanio – Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj en Eŭropo**, kaj irlandia traduko de la tuta retejo [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info). Bruselo: lingvo.info.

#### **7.4.2 Artikoloj**

1974

*Earnán de Blaghd – a dtug sé d’Éirinn* (La kontribuo de Ernest Blythe al Irlando), en: **Macalla** – irlandalingva revuo de la studentoj de la Universitato de Galway, p 37-39. Gaillimh: Ollscoil na Gaillimhe.

1975

*Ionad an Bhéarla in Éirinn (la loko de la angla lingvo en Irlando)*, en: **Macalla** – irlandalingva revuo de la studentoj de la Universitato de Galway, p 37-39. Gaillimh: Ollscoil na Gaillimhe.

1983

*Cuairt air na h-Eileanan Siar (vizito al la Hebridaj Insuloj en Skotlando)*, en la skotgaela, en: **Gaelic Newsletter**, p 29. Aberdeen: Aberdeen College of Education.

*Cuairt ar Québec (vizito al Kebekio)*, en: **Comhar**, junio, p 4-5. Dublino: Comhar.

1984

*An ar fuaidreamh duitse choíche? (Irlanda traduko de la poemo de Goethe, Willst Du immer weiter schweifen?)*, en: **Comhar**, aprilo, p 28. Dublino: Comhar.

1988

*Die "Keltische Renaissance" im 19. Jahrhundert und ihre politischen Folgen (La Kelta Renaskiĝo de la 19a Jarcento kaj ties politikaj sekvoj)*, en: Róisín Ó Mara kaj Diether Schlinke **Wer sind die Kelten?**, p 108-125. Vieno: Monte Verita.

1991

**Western European Phrasebook** (irlandaj kaj kimraj ĉapitroj, 286-294; 488-493). Melbourne: Lonely Planet.

1992

*The Castle Hill Rebellion, Australia (La Ribelo de Castle Hill, Aŭstralio), 1804*, en: **The Lattin-Cullen Journal**, p 12-14. Cullen: Gerard Riordan.

*Grusswort (Salutvortoj) en la Festlibro por festi la 25<sup>a</sup> datrevenon de la Aŭstra-Irlanda Asocio*, p 11. Redaktanto: Diether Schlinke. Vieno: la Aŭstra-Irlanda Asocio.

1995

*La Konsilio de Eŭropo kaj lingvoj de malplimultoj*, en: **Tolero al Minoritatoj**, p 131-133. Maribor: Inter-kulturo.

**Aifreann Gaeilge Melbourne, Lá le Pádraig 1995** (Gratulvortoj al la ĉiujara irlandlingva meso de Melbourne), p 1. Melbourne: An tAifreann Gaeilge.

*Europa Ĉarto pri Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj*, traduko en Esperanto, en: **Jura Tribuno Internacia** N-ro 2, p 74-90. Córdoba: Esperanta Jura Asocio.

1997

**Western European Phrasebook** (irlanda, kimra kaj Esperanta ĉapitroj, 286-294; 488-493; 519-526). Melbourne: Lonely Planet.

1999

*Irlandia w XIX wieku - walka o niepodległość. Problem zanikającego języka Irlandzkiego* (Irlando en la 19a Jarcento – la lukto por sendependeco. La problemo de la malkresko de la irlanda lingvo), en: **Samomodernizacja Społeczeństw w XIX Wieku – Irlandczycy, Czesi, Polacy**, p 21-46. Poznań: Instytut Historii UAM,

2000

*Irlandczyk, który mówi po...irlandzku (i po polsku) (Irlandano, kiu parolas irlande...kaj pole)*, en: Zygmunt Broniarek **Okiem Światowca...lekkoprzymrużonym**, p 287-302. Krakovo: Oficyna Cracovia.

*Irlandia w XIX wieku - problem zanikającego języka Irlandzkiego i jego obrony w przyszłości* (Irlando en la 19a Jarcento – la problemo de la malkresko de la irlanda lingvo kaj ties antaŭenigo estonte). en: **Czas Kultury 2-3/2000**, p 40-47. Poznań: Czas Kultury.

*An tAontas Eorpach agus an Ghaeilge: Féiniúlacht agus Éagsúlacht Teanga (La EU kaj la Irlanda Lingvo: Identeco kaj Lingva Diverseco)*, en: **Feasta**, Decembro, p 23-25. Dublino: Clódhanna Tta.

2001

*Forógra Phrág, Gluaiseacht na Teanga Idirnáisiúnta Esperanto* (irlanda traduko de la Manifesto de Prago), en: **Feasta**, februaro, p 10. Dublino: Clódhanna Tta.

*Don Ghiúdach a d'imigh* (irlanda traduko de la originala poemo de Leon Deij en Esperanto, *Al la Juda Foririnto*), en: **Feasta**, marto, p 4. Dublino: Clódhanna Tta.

Recenzo pri **Crannóga** (Lagoloĝejoj) and **Athbheochan na hEabhraise** (La reviviĝo de la hebrea), en: **Feasta**, majo 2001, p 35-36. Dublino: Clódhanna Tta.

*Fadhbanna Teanga na hEorpa (La lingvoproblemoj de Eŭropo)*, en: **Feasta**, junio, p 8. Dublino: Clódhanna Tta.

*Jesuo vi estu*, Esperanta traduko de la irlanda himno “*Bí a Íosa im chroíse*”, en: **Adoru – Ekumena Diserva Libro**, p 760. Freiburg im Breisgau: IKUE kaj KELI.

2002

*Sprachplanung in Irland* (Lingvoplanado en Irlando), en: **Interlinguistische Informationen, Beiheft 11**: 148-158. Berlino: Gesellschaft für Interlinguistik.

*The Decline and Revival of the Irish Language, and its future in the context of a uniting Europe* (*La Malkresko kaj Reviviĝo de la irlanda lingvo kaj ties estonto en la kunteksto de unuiĝinta Eŭropo*); en: **Beyond Philology**, p 83-101. Gdańsk: Wydawnictwo Uniwersytetu Gdańskiego.

*Grusswort von Dr. Seán Ó Riain, Kulturrat der Botschaft von Irland* (*Salutvorto de D-ro Seán Ó Riain, Kultura Konsilisto de la Ambasado de Irlando, Berlino*), en: **Ansprachen zur Feier der Ehrenpromotion von Professor Hugh Ridley** (paroladoj dum la festo de la honora promocio de profesoro Hugh Ridley). novembro 2002, p 27. Essen: Universität Essen.

2003

*Eŭropa Esperanto-Unio – kongreso en Verona 2002*, en: **Feasta**, januaro, p 24. Dublino: Clódhanna Tta.

*Enkonduko al Hildegard L.C. Tristram The Celtic Englishes III* p 3-5. Heidelberg: Universitätsverlag WINTER.

*Lá na hEorpa – Ráiteas ó Chumann Esperanto an Aontais Eorpaigh* (*La Tago de Eŭropo – deklaro de EEU*), en: **Feasta**, majo, p 26. Dublino: Clódhanna Tta.

*Blumen*, german traduko de la irlanda poemo de Nuala Ní Dhomhnaill, *Bláthanna*, en: **Weltklang – Nacht der Poesie**, p 74. Berlino: literaturWERKstatt Berlin.

*The German interlinguistics society Gesellschaft für Interlinguistik* (*La germana interlingvistika societo Gesellschaft für Interlinguistik*), en: **Language Problems and Language Planning 27**: 3, p 269-277. Amsterdam: John Benjamins.

2004

*Das Mitternachtsgericht* (*Cúirt an Mheán-Oíche*) *in der irischen Literatur* (*La Noktomeza Kortumo en la Irlanda Literaturo*), en: **Von Einem der Auszug...** von Frederik Hetmann / Hans-Christian Kirsch, p 172-182. Krummvisch: Königsfurt Verlag.

*Irland ohne Angst vor der Osterweiterung* (*Irlando sen timo antaŭ la EUpiligandiĝo en oriento*), intervjuo kun Ziko Marcus Sikosek, en: **europa-digital**, 14. April. Berlino: europa-digital.

*En ĉiu eŭropa vilaĝo kaj en Bruselo*, kun Renato Corsetti, revuo **Esperanto**, majo, p 99. Rotterdam: UEA.

*Recenzo pri Linguistic Politics: Language Policies for Northern Ireland, the Republic of Ireland and Scotland*, en: **Teanga 20 – The Irish Yearbook of Applied Linguistics**, p 193-199. Dublino: Irish Association for Applied Linguistics.

*Intervjuo kun la Prezidanto de EEU*, en: **La Ondo de Esperanto** No 10, p 3. Kaliningrad: La Ondo de Esperanto.

*Ni estas tre aktiva asocio kun tre grava mesaĝo*, intervjuo kun Marko Naoki Lins, en: revuo **Esperanto**, decembro, p 251. Rotterdam: UEA.

2005

Malplimultaj Lingvoj, en: **La Ondo de Esperanto** No 5, p 14. Kaliningrad: La Ondo de Esperanto.

*Cár chuaigh an cailín beag (Kien iris la knabineto?)*, irlanda traduko de artikolo de Roman Dobrzynski pri la internacia diskoniĝo de pola popola kanto pere de Esperanto, en: revuo **Esperanto**, februaro; en **Feasta**, aprilo, p 11-12. Dublino: Clódhanna Tta.

2006

*Johann Kaspar Zeuss und seine Grammatica Celtica (Johann Kaspar Zeuss kaj lia Grammatica Celtica)*, p 11, irlanda traduko de la enkonduko, en: **Zeitschrift des Vereins 1000 Jahre Kronach e.V.** Kronach: Verein 1000 Jahre Kronach.

*Les langues et l'identité européenne (Lingvoj kaj la eŭropa identeco)*, en: **Les Langues Modernes** p 73-77. Parizo: Association de Professeurs de Langues Vivantes.

2007

Enkonduka parolado al la Eŭropa Forumo dum la UK, Florenco, en: revuo **Esperanto**, januaro, p 6-7, 9; februaro p 35. Rotterdam: UEA.

*Salutvorto de la Prezidanto de EEU* en la programo de la 7a Kongreso de EEU, p 3. Maribor, Slovenio: EEU.

*The Challenge of Multilingualism Policy and Language Learning (La defio de la politiko de multlingvismo kaj lingvolernado)*, en: **DGTinfo**, decembro 2007, p 14-16. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

2008

*Esperanto por pliefikigi la Eŭropan Union/Could Esperanto make the EU more effective?*, dulinga Esperanto-angla, en: **Interkultura Dialogo kaj Komunikado**, p 64-71. Maribor: Eŭropa Esperanto-Unio.

Malferma prelego dum la franca Esperanto-Kongreso, en la franca, en: **La Informilo**, N-ro 142, p 16. Parizo: UFE.

*Sell the cows, rent out the farm (vendu la bovinojn, ludonu la farmbienon)*, intervjuo kun Colin Murphy, p 64-71. Dublino: en: **the Dublin Review** 32.

Recenzo pri Xabier Arzoz **Respecting Linguistic Diversity in the European Union**, en: **DGTinfo**, julio 2008, p 8-9. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

*Kaj Esperanto kaj Eŭropo vivas*, en: **La Ondo de Esperanto** No 7, p 13. Kaliningrad: La Ondo de Esperanto.

*La politica del multilinguismo e l'apprendimento della lingua (La politiko de multlingvismo kaj lingvolernado, en la itala)*, en: **Futuribili 2-3/2008 – Lingua per unire, lingua per dividere** (Lingvoj por unuigi, lingvoj por dividi), p 134-138. Milano: FrancoAngeli.

Recenzo pri Detlev Blanke kaj Jürgen Scharnhorst **Sprachenpolitik und Sprachkultur** (Lingvopolitiko kaj lingva kulturo), en: **DGTinfo** decembro, p 4-5. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

Recenzo pri Detlev Blanke and Jürgen Scharnhorst **Sprachenpolitik und Sprachkultur**, en: **Language Problems and Language Planning** 32: 3, p 307-309. Amsterdam: John Benjamins.

*Múineadh na Gaeilge – Feabhsú?* (La instruado de la irlanda – plibonigo?), en: **Anam Beo** 1, p 11. Bruselo: Pobal Gaeilge (irlandlingva komunumo).

2009

*Irish and Scottish Gaelic – A European Perspective* (La Irlanda kaj la Skotgaelo – eŭropa perspektivo), en: **Language Problems and Language Planning**, printempo, p 43-59. Amsterdam: John Benjamins.

*Esperanto ĝis 2059*, intervjuo kun Bruĉjo Kasini, en: **Kongresa Kuriero** 8, Bjalistoko, p 2. Bjalistoko: UEA.

Recenzo pri Claude Truchot **Europe: l'enjeu linguistique**, en: **DGTinfo**, marto 2009, p 8-9. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

*Múineadh na Gaeilge: cabhair ó Esperanto?* (La instruado de la irlanda – helpe de Esperanto?), en: **Feasta**, aprilo, p 23-26. Dublino: Clódhanna Tta.

*Bonveniga mesaĝo de la Prezidanto de EEU*, en: la programa de la 8a kongreso de EEU. Herzberg/Harz: Interkultura Centro Herzberg.

Recenzo pri **Plurilinguisme, interculturalité et emploi: défis pour l'Europe**, en: **DGTinfo**, septembro, p 8-9. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

*Les langues et l'identité européenne (Lingvoj kaj la eŭropa identeco)*, en: **Plurilinguisme, Interculturalité et emploi: défis pour l'Europe**, p 329-334. Parizo: L'Harmattan.

*La granda oratora talento de Lapenna*, en: revuo **Esperanto**, novembro, p 222. Rotterdam: UEA.

*Language Policy in Germany and in Europe* (Lingvopolitiko en Germanio kaj Eŭropo), resumo de prelego de Profesoro Rudolf Hoberg, en: **DGTinfo** decembro, p 14-15. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

2010

*La lernado de la irlanda lingvo – ĉu helpe de Esperanto?* en: Detlev Blanke kaj Ulrich Lins **La arto labori kune – Festlibro por Humphrey Tonkin**, p 178-183. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

*EEU renkontis en Bruselo la prezidanton de Eŭropa Parlamento*, en: **Esperanto**, marto 2010, p 68. Rotterdam: UEA.

*Tábhacht na Gaeilge agus an Ilteangachais ar fud na hEorpa* (La graveco de la irlanda kaj de la multlingvismo en Eŭropo), en: **Foinse**, p 6. Dublino: Foinse.

*Irish and Translation – the EU Context* (La irlanda kaj tradukado – la EU-kunteksto), en: **Études Irlandaises**, aŭtuno 2010, p 65-80. Parizo: Études Irlandaises.

2011

*Eŭropa Esperanto-Unio: La plej grava atingo ĝis nun*, en: revuo **Esperanto**, majo, p 103. Rotterdam: UEA.

*Die irische Sprache, Esperanto und die europäische Mehrsprachigkeit* (La irlanda lingvo, Esperanto kaj Multlingvismo en Eŭropo), en: Cyril Brosch und Sabine Fiedler **Florilegium Interlinguisticum – Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag**, p 69-78. Berlino: Peter Lang.

Information on the European Civil Society Platform to Promote Multilingualism and its Recommendations (Informoj pri la Eŭropa Civilsocio Platformo por antaŭenigi Multlingvismon kaj ties Rekomendojn), en: **Język, Komunikacja, Informacja**, kun Jozef Reinwart (red. Ilona Koutny, Piotr Nowak). Poznań: Wydawnictwo SORUS.

2012

Enkonduko al **Star in a Night Sky – an Anthology of Esperanto Literature**, red. Paul Gubbins, p 6-7. Londono: Francis Boutle Publishers.

*L'espéranto, langue de culture(s) (Esperanto, lingvo de kulturo(j))*, kun Mélanie Maradan, en: **Languages and Translation** No 4, marto 2012, p 4-5. Bruselo: Eŭropa Komisiono.

*Civitana iniciato de EEU: Rekomendo kanti la eŭropan himnon en Esperanto*, en: revuo **Esperanto**, majo, p 102. Rotterdam: UEA.

*Enkonduko al* Angela Tellier (ed.) **Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school**, p 6-7. Barlaston: Esperanto UK.

*Irlando*, en la programo de la **9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio**, p 7-8. Galway: EEU.

2013

*Esperanto en “Linguistic Justice for Europe & for the World”*, en: Věra Barandovská-Frank **Littera Scripta Manet – Serta in honorem Helmar Frank**, p 541-551. Paderborn/Praha: Institut für Kybernetik/Kava-Pech.

*An tAontas Eorpach, féiniúlacht agus éagsúlacht teanga (La EU, identeco kaj lingva diverseco)*, en: **Saltair Saíochta, Sanasaíochta agus Seanchais – A Festschrift for Gearóid Mac Eoin**, p 395-406. Dublino/Portland: Four Courts Press.

*Solena Malfermo/Formal Opening*, en: **Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?/How would Europe look today if there were no EU?**, p 13-16. Maribor: EEU.

*La influo de EU je la nordirlanda pacprocezo/EU Influence on the Northern Ireland Peace Process*, en: Zlatko Tišljár (red.) **Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?/How would Europe look today if there were no EU?**, p 123-137. Maribor: EEU.

2014

*Cath le Buachan – Deireadh le maolú na Gaeilge san AE (Batalo kium endas gajni – la forigo de la irlandlingva derogacio en EU)*, en: **FEASTA**, januaro, p 25-26. Dublino: Clódhanna Tta.

*Antaŭparolo al* Rafaela Urueña, **Eŭropa Unio, paŝon post paŝo**, p 11-12. Córdoba: Esperanto Jura Asocio.



*Salutvorto de la Prezidanto de EEU* en la programo de la 10a Kongreso de EEU. Rijeka, Kroatio: EEU.

*La Eŭropa Parlamento kaj Esperanto*, en: revuo **Esperanto**, julio-aŭgusto, p 156-157. Rotterdam: UEA.

(Laŭ manuskripto de [sean.oriain@dfa.ie](mailto:sean.oriain@dfa.ie))

## **8 Forpasis Ignat Florian Bociort (1924-2015)**

La eminenta rumana esperantisto *prof. d-ro Ignat F. Bociort* forpasis la 2-an de decembro 2015 en Berlino en la aĝo de 91 jaroj (pri li ankaŭ vidu la ampleksan omaĝon en IpI 90, 21-23). Li studis filozofion kaj filologion en la Universitato de Bukareŝto kaj doktoriĝis pri filozofio en la Humboldt-Universitato en Berlino. De 1950 ĝis sia pensiigo en 1987 li instruis en la universitatoj de Bukareŝto kaj Timișoara kiel asistanto, lektoro, docento kaj profesoro.

Bociort lernis Esperanton en la 1960-aj jaroj en Berlino (laŭ influo de *Detlev Blanke*), kiam li estis gastdocento en la Humboldt-Universitato, kaj post sia reveno al Rumanio fariĝis ĝia ĉefa disvastiganto tie spite al la malvarma sinteno de la aŭtoritatoj kaj al la malpermeso de la lingvo en 1985, kiu daŭris ĝis la falo de la diktaturo fine de 1989.

Li multe prelegis pri Esperanto: al studentoj en 8 universitatoj, al la senatoj de 5 universitatoj, en 3 kulturdomoj ktp.

En 1978 Bociort sukcesis starigi la unuan oficialan ĝermon de la movado en Rumanio, la Kolektivon Esperanto kaj Interlingvistiko kadre de la Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Samjare li atingis ankaŭ enkondukon de Esperanto kiel nedeviga sed egalrajta kurso en la filologiaj fakultatoj de la lando. Tio ebligis poste la estigon de Esperanto-sekcio en la tutlanda asocio de filologoj kaj aperigon de vortaroj kaj lernolibroj ĉe universitataj eldonejoj, i.a. de la lernolibro "Curs elementar de Esperanto" (1983), kiun Bociort aŭtoris kun *Mioara Dobre*. Dank' al liaj klopodoj aperis en Esperanto du numeroj de la revuo "Ferioj en Rumanio" (1978, 1983). En 1990 Bociort iĝis la unua prezidanto de la refondita Esperanto-Asocio de Rumanio, kiu poste elektis lin sia honora prezidanto. Ekde 1992 li estis orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino.

Krom pri estetiko kaj literaturo, Bociort verkis rumane ankaŭ pri interlingvistiko kaj Esperanto: "Lucrări practice de Esperanto - interlingvistică" („Praktikaj taskoj por Esperanto kaj interlingvistiko“, 1979, repr. 1980), "Esperanto pentru începători" („Esperanto por komencantoj“, 1992) kaj "Către tinerii mei cititori: Esperanto în actualitate" („Al miaj junaj legantoj: Esperanto aktuale“, 2000). Li

estis kunaŭtoro de la unua granda Esperanto-vortaro por rumanoj, "Dicționar esperanto-român", kun 10 000 kapvortoj (1995).

En Esperanto li kontribuis al multaj periodaĵoj kaj kolektivaj verkoj per originalaĵoj kaj tradukaĵoj. Kiel apartaj eldonaĵoj aperis i.a. "Kritiko de la tezoj neantaj la progreson de la literaturo kaj arto" (1983), "La spirito de Esperanto kaj la 'samideanaj' malamikaĵoj" (1999; rumana eld. 2004) kaj "Bedaŭrinda verko" (rebato al T. Carlevaro; 2007). En 2007 aperis impona kolekto de liaj eseoj, raportoj, recenzoj kaj beletraĵoj, "Esperanto: movado, strategio, estetiko, rakontoj".

En 1998 Bociort estis elektita Honora Membro de UEA. Ĝis lia grava malsaniĝo li restis mense vigla kaj partoprenis en la esperantista agado en Berlino.

Ankoraŭ en aŭgusto ĉi-jare (2015) aperis ampleksa intervjuo kun li en "Cultura", unu el la plej gravaj rumantaj kulturaj revuoj, titolita "Despre noua ordine lingvistică globală" (Pri la nova tuttera lingva ordo). En la revuo Alice Ruda intervjuas prof. Bociort, kiu kompetente respondas al demandoj rilataj al la nuna stato de interlingvistiko kaj Esperanto, precipe en Rumanio; kelkaj kaŭzoj de la ne aparte bona stato de tiuj du fakoj en la nuna Rumanio; la bezono kaj utilo de komuna neŭtrala lingvo.

(Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 598, kompletigita de Ionel Ioneț).

## 9 Serĉata administranto por ESF

Esperantic Studies Foundation (Montrealo) kaj la Novjorka oficejo (por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj) de Universala Esperanto-Asocio serĉas part-tempan aŭ volontulan administranton kapablan prizorgi la financon administradon de ESF kaj la Novjorka oficejo.

Kvalifikaĵoj: kapablo pri librotenado (prefere kun sperto pri QuickBooks aŭ preteco ĝin lerni), kapablo skribi Esperanton, akurateco. Preferata, kvankam ne necesa, estus loĝanto de la novjorka aŭ montreala regiono.

Tiu persono kunlaborus kun la direktoro de ESF, *Joel Amis*, kaj la reprezentanto de UEA ĉe UN, *Humphrey Tonkin*. Temus pri ideala laboro por emerito aŭ suplementa laboro por homo kun alia regula posteno. Salajro dependa de horoj laborataj kaj de kvalifikaĵoj.

Skribu al: [tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu)

## 10 Ĝi tre mov(ad)as – belartkonkursaj rikolto

*Lipari, Michela/ Tonkin, Humphrey (2015, Red.): Tamen ĝi moviĝas. Eseoj pri la Esperanto-movado. (Belartaj Konkursoj de UEA). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 152 p.*

## **Enhavo**

*Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari.* Enkonduko

*Mark Fettes.* Dance sur alta ŝnuro: La Esperanto-movado inter idealo kaj realo

*Nikola Rasic.* Pledo por sociologio de la Esperanto-movado

*Mark Fettes.* Demokrateco, neŭtraleco, aŭtonomeco: La ideologia evoluo de Universala Esperanto-Asocio

*Sen Rodin.* Post legado de *La Mava Lingvo*

*Toño del Barrio.* La normala lingvo

*Pieter Doumen.* Lingvo: Trezoro de la popolo

*Paulo Sergio Viana.* La tri doktoroj

*Robert Lloancy.* Kongresa enigmo aŭ enigma kongreso?

*Paulo Sergio Viana.* La literatura vivigo de Esperanto: La elektoj de Zamenhof por tradukado

*Olle Hällefors.* "... strebad' iel valoras eĉ en duongrad'" – Paco kaj homa kunaparteno en la Esperanta literaturo

*Brandon Sowers.* Perspektivoj pri Esperanta kinarto

*Sten Johansson.* Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999

*Carlo Minnaja.* Postparolo

*Michela Lipari:* Familio Minnaja

*Luigi Minnaja.* Al Carolina 70-jara

Pri la aŭtoroj.

## **11 Enciklopedieto de Esperanto**

Jen nova verko de la ege produktiva *André Cherpillod*:

*Enciklopedieto de Esperanto konforme al la fundamento. Courgenard: La Blanchetière.* 2015, 158 p.

André CHERPILLOD

# Enciklopedieto de Esperanto

konforma al  
*la Fundamento*



Eldono La Blanchetière

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .